

# ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



**ORIENTO VOKAS**  
*Dancistoj de "Kathakali", tradicia danco de Suda Hindujo.*

**N-ro 636 (11)**  
**Novembro 1958**

**Universala  
Esperanto-Asocio**

**(En Konsultaj Rilatoj kun  
U.N.E.S.C.O.)**

Fondinto: H. HODLER

Geredaktoroj: kand. ekon. H. V. Rasmussen kaj s-ino Kirsten Zacho.

**Cion por la redakcio** oni sendu al la Redakcia adreso: S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

**Cion pri administrado de UEA** kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C., Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964 Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

**Bankisto de U.E.A.:**

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

**Traduko kaj represo** de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

**Jara abono (1958):** 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

**Tarifo por reklamoj:**

1 paĝo 128,— gld 1/2 paĝo 64,— gld 1/4 paĝo 32,— gld 1/8 paĝo 16,— gld 1/16 paĝo 8,— gld

**Anoncetoj pri korespondado:**

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

**Legantoj en 80 landoj.**

**Estraro de U.E.A.:**

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzì, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

**Centro de Esploro kaj Dokumentado**

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

**Serva Centro,** Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto: Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

## Enhavo

La graveco de la lokaj grupoj . . . . .	169
Nia statistiko . . . . .	169
Esperanto en U.N. . . . .	170
Unuiĝo de Internaciaj Asocioj . . . . .	170
Ĉefkunveno de I.A.J.E. en Mainz . . . . .	170
Azio malfermas novajn horizontojn . . . . .	171
Impona Ekspozicio en Brazilo . . . . .	173
Nova venko . . . . .	174
Nia Universala Ekspozicio . . . . .	174
"The missing link" . . . . .	174
La 17-a regulo . . . . .	176
Belartaj Konkursoj 1958 . . . . .	177
Korekto . . . . .	180
Belarta Konkurso 1959 . . . . .	181
Leteroj al la redakcio . . . . .	182
<b>Rubrikoj:</b>	
La Juna Vivo . . . . .	175
La internaciaj konkursoj . . . . .	176
Magnetofona servo . . . . .	180
Tra la mondo . . . . .	180
Radio . . . . .	181
Nova libro . . . . .	181
Esperantista Vivo . . . . .	181
44-a Universala Kongreso . . . . .	182
C.E.D. . . . .	183
Oficiala Informilo . . . . .	184

Manuskriptoj por "Esperanto" devas esti klare tajpitaj sur unu flanko de la folioj, kun interlinia spaco, en perfekta Esperanto kaj en du ekzempleroj. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

**OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

# La graveco de la lokaj grupoj

NIA STATISTIKO

En la nuna stadio la Esperantismo estas ankoraŭ movado batalanta en la senco, ke ĝi organizite luktas por la plua disvastigo kaj socia firmigo de la Internacia Lingvo. Ĝi restos tia ankaŭ en la antaŭvidebla estonteco: ĝis la momento, kiam Esperanto estos konkerinta la mondon kaj akirinta la pozicion de sola rimedo de komunikado en ĉiuj internaciaj rilatoj.

Movado kun tia karaktero daŭre frontas plej diversajn problemojn. Ĝi devas senĉese interne fortikiĝadi, superregadi obstaklojn, venkadi eksterajn konsciajn kontraŭstarojn. Ĝi devas konstante iri antaŭen, ĉar stagno identas al regreso kaj povas signifi eĉ morton.

Pro la kunliga rolo de la Internacia Lingvo kaj pro la universaleco de la Esperanto-Movado, en ĝi tiu problemaro estas ankoraŭ pli kompleksa, precipe en la hodiaŭa mondo, multrilate dividita.

La neŭtrala Esperanto-Movado, organizita en UEA, certe jam solvis multajn tre gravajn demandojn. Ke tiuj solvoj estis kontentigaj, montras multaj pozitivaj rezultoj, kiujn facile vidas ĉiu, kiu ne estas blinda aŭ kiu intence ne fermas la okulojn.

Tamen, restas multaj aliaj problemoj, postulantaj la plej seriozan konsideron. Unu el ili — nuntempe la plej urĝa interne de la Movado — estas tiu de la lokaj Esperanto-grupoj.

La lokaj Esperanto-societoj estas la bazaj unuoj de la Esperanto-Movado. Ili estas, aŭ devas esti, la ĉefaj lokoj, el kiuj disvastiĝas la loka informado pri la Internacia Lingvo, kie kreiĝas novaj esperantistoj, kie la lingvo estas daŭre praktikata kaj en kiuj formiĝas la estontaj funkciuloj de niaj organizaĵoj. Sen la ekzisto kaj laboro — kelkfoje kaj kelkloke eĉ bonega laboro — de la lokaj grupoj en la tuta mallonga historio de Esperanto, ne estas imageblaj la ĝisnunaj atingoj de la Internacia Lingvo en landaj kaj mondaj ampleksoj.

Tio estas fakto. Sed fakto ankaŭ estas, ke, ĝuste pro la graveco de la societoj, por atingi pli grandajn sukcesojn en la baldaŭa estonteco kaj ĝenerale por rapidigi la progresadon de Esperanto, estas necese konsiderinde pligrandigi la nombron de la lokaj grupoj kaj plibonigi la laboron de la ekzistantaj.

Laŭ la komisiono de la Estraro de UEA, s-ro J. Strönne, komitatano de UEA prezentis pri tiu demando ampleksan bonegan raporton al la kongreso en Mainz. La Dua Sekcio pritraktis la aferon en du kunsidoj. La rezultoj de la diskuto estas formulitaj en mallonga rezolucio. La interŝanĝoj de spertoj dum la diskutoj en la Sekcio, kaj ankaŭ ekster ĝi, sendube iom kontribuos al plibonigo de la laboro de niaj societoj. Sed tio per si mem tute ne sufiĉas. La aktuala problemo de niaj lokaj societoj estas tiel multflanka, ke ĝi postulas la plej larĝan kaj plej profundan pritrakton: en la societoj mem rilate la plibonigon de la laboro kaj paralele kreskigon de la membraro; en la organoj de la landaj asocioj ĉefe koncerne la fondon de novaj societoj. La Estraro de UEA, siavice, esploras kian helpon ĝi povas doni.

Kiel bazo de la agado en tiu direkto servu la Strönne-raporto kaj la konkludoj de la Sekcio. Oni esploru kio konkrete estas farebla en ĉiu unuopa lando kaj en ĉiu societo, depende de la faktaj cirkonstancoj kaj eblecoj en tiu lando kaj loko. Certe, ne ĉio sugestita en la raporto kaj en la diskuto estas realigebla en ĉiu loko, sed, same certe, absolute ĉie — kun la escepto de la landoj, en kiuj la Esperanto-organizaĵoj estas malpermesitaj — la laboro de la societoj estas plibonigebla kaj novaj grupoj estas fondeblaj.

(Daŭrigo paĝo 170)

*La membrostatistiko, kiel ĝi aperas en tiu ĉi numero post paso de tri kvaronoj de la jaro, meritas iom pli detalan konsideron.*

*Je supraĵa rigardo oni konstatas ian regreson. La nombro da asociaj membroj montras diferencon de pli ol 1000. Kulpas pri tio kelkaj landaj asocioj, kiuj malgraŭ niaj insistaj petoj frue transigi la AM-kotizojn, tion tamen ankoraŭ ne faris. Ni varme esperas ke en tre proksima tempo ili tion bonigos.*

*En la tri grandaj grupoj de individuaj membroj, MJ, MA kaj MS, ni vidas malpliigon de entute 877. La kaŭzo de malpli granda nombro da MS sendube estas la altigo de la kotizoj en tiu ĉi jaro. Pluraj el tiuj kiuj antaŭe libervole pagis pli ol strikte necese por ricevi gazeton kaj jarlibron, nun reiris al la kategorio MA. Sed ĝenerale, la kaŭzo de la malpliigo estas tute alia ol la pli altaj kotizoj. En 1957 U.E.A. havis en la landoj Bulgarujo kaj Ĉeĥoslovakio kune 737 membrojn en la menciitaj kategorioj. Ĉar intertempe evidentiĝis bedaŭrinde la absoluta malebleco transpigi la kotizojn el tiuj landoj — kontraŭa al pli fruaj esperigaj simptomoj — ni estis devigitaj en 1958 limigi la nombron da individuaj membroj en tiuj du landoj al po 50, ekster la eventualaj adoptitoj. La sekvo estas, ke en tiu ĉi jaro U.E.A. havas en tiuj landoj kune nur 137 membrojn, kio signifas ke ni perdis tie precize 600 ind. membrojn. La membroperso ekster tiuj du landoj estas do nur 277.*

*Kiam la Komitato en Marseille decidis pri la plialtigo de la kotizoj, la budĝeto por 1958 estis bazita pesimisme je konsekvenca perdo de 10% de la individuaj membroj. Ĉar en 1957 la membronombro en la tri konsiderataj kategorioj sen Bulgarujo kaj Ĉeĥoslovakio sumis 6209, tiel ke 10% da regreso signifus pli ol 600 membrojn, estas klare ke la altigo de la kotizoj — sen kiu la Asocio ne povis daŭrigi sian laboron — kaŭzis ĝis*

## Esperanto en UN

La 10-an de septembro fondiĝis UN-Esperanto-klubo post fino de du oksemajnaj kursoj kiujn gvidis S-ro Eskil Svane, el Danlando, kaj kiujn partoprenis UN-oficistoj el 13 diversaj landoj.

La fondo de la klubo okazis dum vespero aranĝita kunlabore kun la UN-film-klubo, kiu tiukaze prezentis esperantlingvan filmon "Jen Novzelando".

Post la aprobo de la statutoj, la fondantaj membroj (19 personoj el 11 landoj) elektis estraron konsistantan el S-ro Piron (Belgujo), prezidanto, S-ro González (Usono), vicprezidanto, S-ino Ravenet (Kubo), sekretariino, S-ino Nylén (Meksikio), kasistino, F-ino Andreassian (Libano), bibliotekistino, kaj S-ro Gutmans (Usono).

En Januaro, t.e. post la fino de la Ĝenerala Asembleo, nova kurso okazos sub la gvidado de S-ano Piron.

La kreo de UN-esperanto-klubo povas havi grandan signifon por la progreso de nia movado. Ekzistas ebleco, ke UN eldonu esperantlingvajn publikadojn, kaj organizu esperantlingvajn radiodisendojn, se montriĝos sufiĉe da intereso. Bonvolu skribi esperantlingve por demandi ĉu ekzistas esperantaj eldonaĵoj aŭ radio-

elsendoj de Unuiĝintaj Nacioj, rekte al Office of Public Information, United Nations, New York, N.Y., Usono.

Bonvolu represi.

## Unuiĝo de Internaciaj Asocioj

Universala Esperanto-Asocio estis reprezentata de D-ro P. Kempeneers en la Konferenco de la Unuiĝo de Internaciaj Asocioj, kiu okazis en Bruselo la 3-an kaj la 4-an de Septembro 1958.

La prezentitaj raportoj detale montris la malfacilaĵojn, kiuj malhelpas la internaciajn asociojn — demandoj pri personoj, financaj problemoj — kaj larĝe pritraktis la monajn ŝarĝojn kaŭzigitajn de la plurlingveco: salajroj de tradukistoj, kostoj de plurlingvaj presaĵoj, k.a.

La reprezentanto de U.E.A. akcentis, ke tiu Asocio ne konas tiujn problemojn, ĉar nia lingvo permesas senperan kontakton inter ĉiuj. Li proponis ke la Unuiĝo pristudu tiun solvon, kiu ŝparigus tempon, energion, kaj malfacile akireblan monon.

## Ĉefkunveno de I. A. J. E. en Mainz

Pro bedaŭrinda eraro la raportaro sub "Fakaj kaj neneŭtralaj organizaĵoj" en n-ro 634 (9), p. 143-4, ne estas kompleta, ĉar ne estas menciita la ĉefkunveno de la Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj.

La kunveno okazis dimanĉe la 3-an de aŭgusto, kaj ĝin ĉeestis 17 juristoj el 11 landoj. Unue oni pritraktis la detalojn de la publika arango, merkrede la 6-an de aŭgusto. D-ro Herrmann raportis pri la sendita invito al la advokatoj de Mainz. La kunveno decidis pri la kunraportantoj kaj pri la aliaj organizaj detaloj, aprobis la raporton de la sekretariokasisto pri la pasinta laborjaro kaj elektis estraron konsistantan el Prof. D-ro Ivo Lapenna kiel prezidanto, D-ro Sakowicz kaj D-ro Herrmann kiel vic-prezidantoj kaj Sven Ziegler kiel sekretariokasisto. La kunveno decidis instigi ĉiujn membrojn aliĝi kiel individuaj membroj al UEA kaj fariĝi fakdelegito pri juro. Ĉar IAJE ne povas esti akceptata kiel kolektiva membro de International Law Association, la kunveno decidis instigi la membrojn de la asocio aliĝi al ILA kiel individuaj membroj.

Por tiu ĉi granda kaj grava kampanjo estu utiligataj ne nur specialaj kunvenoj de la lokaj societoj kaj apartaj kunsidoj de la landaj asocioj, sed ankaŭ intergrupaj konferencoj de unuopaj regionoj. En la gazetoj, precipe en la oficialaj organoj de la landaj asocioj, oni pritraktu la problemon, kuraĝigu la agadon de la lokaj societoj, donu ekzemplojn de sukcesa laboro, imitinda de la aliaj. La plej elstaraj ekzemploj de vere modelaj societoj el diversaj landoj estos prezentitaj laŭvice en la sekvantaj numeroj de la revuo "Esperanto". Dum la U.K. en Varsovio tre verŝajne okazos speciala kunveno de la rajtigitaj reprezentantoj de la lokaj grupoj kun la celo diskuti la rezultojn, atingotajn en tiu ĉi laborjaro, interŝanĝi la spertojn kaj sugesti pliajn plibonigojn.

Unu el la grandaj taskoj en la Jubilea Zamenhof-Jaro estu la plifortigo de la ekzistantaj lokaj societoj kaj la kreo de kiel eble plej multaj novaj!

I. L.

MEMORU LA FONDAĴON-ZAMENHOF!

nun falon ne de 10% sed de malpli ol 4,5%, kio certe ne estas maltrankviliga. Aliflanke ni firme kredas ke multaj malnovaj membroj, kiuj ĝis nun ne pagis pro forgesemo, ankoraŭ aliĝos antaŭ la fino de la jaro.

El la supraj konsideroj ĉiu certe klare komprenas ke niaj statistikoj estas farataj ekzakte laŭ la nombroj da pagitaj kotizoj. Ni akcentas tion, ĉar en iu ekstereŭropa kontinento naskiĝis onidiro pri enmeto de iuj ajn iamaj membroj por altigi la ciferojn. Plia komento pri tio certe estas superflua.

VARBU MEMBROJN DUM LA ZAMENHOF-JARO!

Direktorino C.O.

# Azio malfermas novajn horizontojn

Meditado post trijara vagado kaj agado tra tiu vasta kontinento

Kiam mi kombinis mian nekuraceblan vojaĝemon kun mia same nekuracebla deziro labori por Esperanto tie, kie tiu laboro estas pleje bezonata, mi povas diri, ke mi sukcesis kunligi la agrablon kun la utilo. Duoble agrablan, ĉar laboro por la progreso de esperanto ĉiam plenigadis min per ĝojo, kaj ankaŭ duoble utila, ĉar miaj vagadoj ofte alportas fruktojn en formo de novaj scioj kaj novaj verkoj. El ambaŭ vidpunktoj mi povas diri ke Azio estis sperto nesupe-rebla.

Mi ne citos ĉi tie multajn detalojn el mia agado, kiun mi jam grandparte priskribis en "ESPERANTO", nur resumos mallonge. Mia laboro komenciĝis en Grekujo, ĉe la sojlo de Azio, post kiu mi restadis en Turkujo kaj Izraelo po tri monatojn. Iranon mi nur travojaĝis, kaj koncentrigis mian agadon al Hindujo, kie mi pasigis unu jaron, en tri etapoj. Intertempe mi vizitis Ĉinuojn kaj Birmon, kaj Nepalon, restante en tiu ĉi lasta dum ses monatoj. Fine mi pasigis kelkajn semajnojn en Cejlono kaj Pakistano antaŭ ol reflugi al Eŭropo, por alteriĝi meze de la Majenca Kongreso.

En Grekujo akompanis min s-no Zeljko Takaĉ el Zagreb, klopodante por esperanto en Ateno, dum f-ino Elsie Parson sindone helpis min per gvidado de kursoj en Saloniko, Istanbulo kaj Delhi, dum du jaroj.

Entute la azia gazetaro publikigis centon da artikoloj, intervjuoj kaj notoj pri nia vizito kaj pri esperanto aŭ almenaŭ menciante ĝin; proksimume 50 prelegojn mi faris pri esperanto, kaj f-ino Parson faris unu. Ni gvidis 9 kursojn, el kiuj s-no Takaĉ 1, f-ino Parson 3 kaj mi 5. La rezulto de tiu laboro estis la fonda de kvar societoj, en

Kathmandu (Nepalo), Delhi, Bombay kaj Madras (Hindujo). Ni fondis societon ankaŭ en Istanbul, sed tiu disiĝis baldaŭ post nia foriro. Fine, kiel broĉo fermanta la unuan epokon de APO — Agado en Proksima Oriento — ni fondis la SUDAZIA ESPERANTO FEDERACIO-n, kun partopreno de Hindujo, Nepalo, Cejlono kaj Indonezio, entute kun 260 membroj.

En novembro 1956 mi reprezentis UEA en la UNESKO-konferenco, pri kiu mi raportis siatempe, kaj en la Konferenco de Aziaj Verkistoj, en kiu mi reprezentis la Esperantoliteraturon. Krome mi prenis sur min la taskon intervjui elstarajn personojn de la politika kaj kultura vivo de la vizitataj landoj, por informi ilin pri la progreso de la internacia lingvo dum la lastaj jaroj, kaj klopodi atingi ilian simpatiansinteno al nia afero. Inter aliaj mi interparolis en Grekujo kun la ĉefministro kaj la edukministro, en Turkujo kun la edukministro, rektoro de la universitato kaj urbestro de Istanbul, en Izraelo kun la prezidanto s-ro Isaak Ben Zvi, en Hindujo kun la ĉefministro s-ro Nehru, kun la vicprezidanto d-ro Radhakrishnan, la edukministro s-ro Humayun Kabir, la rektoroj de pluraj universitatoj, funkciuloj de sciencaj kaj literaturaj akademioj kaj aliaj. En Nepalo kun reĝo Mahendra, la

edukministro kaj pluraj aliaj ministroj, kaj en Cejlono kun la ĉefministro s-ro Bandaranaike kaj la ministroj de edukado kaj de kulturaj aferoj. Tiuj ĉi du lastaj volonte akceptis esti membroj de la Honora Patrona Komitato de la Zamenhofaj festoj.

Estas malfacile trovi ĝeneralan formulon pri la sinteno de la intervjuitoj. Ĉiuj ili jam estis aŭdintaj



Arte ellaborita temploturo en Hindujo.

pri esperanto, sed la plejparto de ili opiniis, ke temas pri projekto jam elmodiĝinta; tamen post la necesaj klarigoj kaj elmontrado de la "hazarda" enhavo de mia paperujo, mi ricevis tre kuraĝigajn vortojn de pluraj el ili. La edukministroj de Grekujo kaj Turkujo promesis efike helpi la ideon laŭ siaj povoj. La prezidanto de Izraelo, s-ro Ben Zvi diris: "Kun diplomatoj kaj aliaj fremduloj mi ŝatus paroli en hebrea, kiu estas mia lingvo, sed se tio ne eblas, mi preferas esperanton ol iun ajn alian lingvon." D-ro Radhakrishnan, vicprezidanto de Hindujo kaj longjara profesoro de filozofio en Oxford, diris: "La hodiaŭa mondo pli ol iam ajn bezonas interkompreniĝon kaj kunlaboradon. Se esperanto povas kunhelpi al tiu celo, mi nepre favoras ĝin." La reĝo Mahendra de Nepalo deklaris: "Mia lando estas membro de la UNO. Mi scias ke Esperanto kunhelpas al ĝiaj celoj pere de kunlaboro kun UNESKO, kaj pro tio ni rigardas kun simpatio la Internacian lingvon. Tian ilon la moderna mondo ege bezonas." Kaj por konfirmi tiun opinion, lia edukministro petis min ke mi instruu lin esperanton, kion mi volonte faris.

Kaj kia estas la sinteno de la popolo de tiuj landoj? La klarigoj pri esperanto foje surprizas la komunan homon, foje kolizias kontraŭ diversaj antaŭjuĝoj, inter kiuj la ĉefaj estas 1. la vasta uzo de la angla lingvo en kelkaj el la landoj, 2. la laŭŝajne eŭropa karaktero de esperanto, kaj 3. la graveco de la problemo de naciaj lingvoj en pluraj aziaj landoj. Sed al tiaj kritikoj ni facile elbuŝigis la respondon: 1. En Hindujo kaj aliaj iamaj britaj kolonioj, kompreneble la angla lingvo estas vaste uzata, sed en pluraj aliaj aziaj landoj oni preferas la francan, la nederlandan aŭ la rusan respektive. Krome iu ajn nacia lingvo malfermas nur "fenestreton" por rigardi al la kulturo de la koncerna nacio, sed lasas en mallumo la kulturojn de aliaj nacioj, kaj interkompreniĝon kun ili. Nur neŭtrala internacia lingvo povas malfermi larĝan pordon



Kursfinfesto en Madras. Meze sidas s-ro Sekelj, la kursgvidanto.

por komuniĝo kun la tuta mondo. 2. La gramatiko de esperanto ne estas eŭropa, ĝi estas tuthoma pro sia simpleco; ĝia aglutina karaktero alproksimigas ĝin al kelkaj aziaj lingvoj, kaj preskaŭ la duono de ĝia vortaro devenas rekte aŭ nerekte el Sanskrito. Do ĝuste la azianoj havas sufiĉe da kialo por senti ke esperanto estas ankaŭ "ilia" lingvo. 3. La problemo de la naciaj lingvoj estas tre grava por la interna ordo en la lando, kaj ĝi bezonas grandan atenton. Sed nuntempe la komunikado kun eksterlando estas gravega parto de la vivo de ĉiu nacio, kaj tial oni perdas konsiderindan tempon kaj energion instruante kaj lernante plurajn malfacilajn fremdajn lingvojn. Ni proponas la lernadon de nur unu facila, kiu solvus la tutan problemon en harmonia maniero, egaligante grandajn kaj malgrandajn almenaŭ el lingva vidpunkto.

Tiaj klarigoj en granda plimulto de kazoj trovas la aprobon de la interparolanto, senkonsidere al kiu klaso, profesio aŭ aĝgrupo li apartenas. La interesiĝo pri la progresado de la moderna mondo kaj ĝiaj avantaĝoj estas tre granda en Azio. Pro tio, mia sperto estas, ke kie ajn oni eklaboras en la konvena maniero, la rezulto estas sukceso. Mi elektis kvar urbojn en suda Azio, kaj mia agado estis sukcesa. Sed mi povus elekti aliajn inter pluraj centoj da urboj, kaj la rezulto povus esti la sama.

La impresojn pri miaj aziaj esploroj koncerne esperanton mi povus resumi jene. La nacioj de Azio travivas vekigon al nova erao, erao de interna progreso pere de intensigo de interrilatoj kun pli progresintaj landoj, kaj plivigligo de interrilato inter diversaj aziaj kaj afrikaj landoj. Ili komencas konsciiĝi ke ili ne nur povas multon lerni de aliaj landoj, sed eĉ rajtas instrui pri siaj propraj tradiciaj kulturoj. Tia nova mondrigardo nepre postulas komunan lingvon. La unua penso estas adopti iun eŭropan lingvon. Tamen, tiu ideo estas tre anti-patia en Azio, ĉar ĝi memorigas al la kolonia juko, kiun ili sukcesis deskui, kaj ŝatus forgesi. La dua ideo estas, ke oni povu adopti iun el la aziaj lingvoj. Sed neniu el ili, ĉina, japana, hinda, persa, araba aŭ indonezia, aŭ iu ajn alia, taŭgas por tiu celo, pro la nesufiĉa evoluiteco de tiuj lingvoj por la modernaj bezonoj, pro iliaj malfacilaj skribsistemoj, pro la naciaj rivalecoj, kaj pro la pure provinca aŭ tro mallarĝe nacia karaktero de ĉiuj tiuj lingvoj.

Jen pro kio la tria solvo, la adopto de neŭtrala kaj facila lingvo, kiu per unusola frapo povus malfermi ĉiujn pordojn, tiujn de la kontinenta interkompreniĝo, kaj tiun de la internacia kontakto en monda skalo, trovas favoran grundon en Azio.

Sed la favora grundo per si mem ne sufiĉas. Ĝi atendas la aktivan elementon, la agadon de la esperantistoj. Tie do, por nia agado malfermiĝas novaj horizontoj, neimageble vasta agadkampo. Mi komencis la laboron, sed mi ne faris eĉ la cen-

# Impona Ekspozicio en Brazilo

**sub tute novaj aspektoj, estos organizita en Rio de Janeiro, ĉefurbo de Brazilo, sub la aŭspicioj de la Brazila Esperanto-Ligo, en Januaro de 1959.**

La celo de tiu impona Ekspozicio estas ne nur digne omaĝi la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, sed ankaŭ montri, amplekse, al la publiko neesperantista, al ĉiuj kulturaj, edukaj medioj, per la plej taŭga kaj impresa formo, la progresadon kaj la konsiderindajn sukcesojn de Esperanto en la tuta mondo.

Krom la standoj de libroj, revuoj, gazetoj, k.t.p. oni planis interalie ankaŭ prezenti ĉiujn Esperantistajn Landajn kaj Fakajn Asociojn, senescepte, kaj la tutan reton de la Delegitoj de U.E.A., ordinaraj kaj fakaj.

La Esperantistaj kaj Fakaj Asocioj estos reprezentataj per fotoj de la respektivaj estraranoj, kaj la Delegitaro per bildkartoj. Tiuj fotoj kaj bildkartoj estos aparte bele aranĝitaj sur grandaj,

artaj paneloj, laŭ landoj. Sed por ebligi tiun ja mirindan elmontraĵon pri la rimarkindaj venkoj de la tutmonda Esperantista Movado estas necesa, kompreneble, internacia helpo; tial B.E.L. sin turnas al ĉiuj Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Delegitaro, al ĉiuj esperantistoj kaj petas, ke urĝe :

1) ĉiu estrarano, individue, sendu afable sian foton, tiel grandan kiel bildkarton, almenaŭ prunte;

2) ĉiu delegito, ordinara aŭ faka, sendu afable la plej belan bildkarton, preferinde en koverto por ne ĝin difekti;

3) ĉiu esperantisto helpu laŭ sia ebleco kaj bonvolu sendi bonajn, novajn publikigaĵojn en Esperanto, prospektojn, reklamojn, flugfoliojn, bultenojn, informilojn, afiŝojn, glumarkojn, Esperanto-poŝtmarkojn, unuvorte, ĉion, kio utilos por plej bone impresi al la vizitantoj, kaj pruvi la sukceson de Esperanto.

La petitan materialon bonvolu sendi al la Direktorino de la Ekspozicio-Plano, *F-ino Yolanda Costa, Praça da República, 54, 1<sup>o</sup>, Rio de Janeiro, Brazilo.*

tonon de tio, kio estas fareda dum la proksimaj kelkaj jaroj, se ni deziras profiti la favoran tajdon. La progreso de esperanto en Azio reperkutos profunde sur la marŝon de nia movado en la mondo. Ne nur ĉar en Azio loĝas la duono de la homaro, sed ankaŭ ĉar la landoj de tiu kontinento akiras kreskantan influon en la mondo.

Dum la Majenca Kongreso UEA kaj ĝia Komitato montris klaran komprenemon pri la problemo. Laŭ mia propono la Komitato decidis pagi la vojaĝelspezojn al iu azia lando al unu aŭ du APO-anoj — informantoj, instruantoj kaj organizantoj — kiuj kapablas vivteni sin iamaniere en tiu lando. Kiel unua el tiuj senditoj baldaŭ forveturos sinjorino Haudebine, la konata franca Cseh-instruistino, kiu jam dum pli ol dudek jaroj laboris por esperanto en multaj eŭropaj landoj, kun tre bona sukceso. Dum mi skribas tiujn ĉi liniojn, ŝi estas preparanta sin, kaj je nomo de UEA mi deziras al ŝi agrablan restadon kaj sukcesplenan laboron en Oriento. Laŭ nia interkonsento ŝi laboros kelkajn monatojn en Delhi, Hindujo, kaj poste en Kathmandu, Nepalo, por plifortigi tiujn jam ekzistantajn societojn per novaj kursoj. Laŭdeziro, ŝi povas plilongigi sian restadon tie por plua aŭ pluaj jaroj.

Sed, kiel mi diris, tie estas laboro por multaj aliaj lertaj esperantistoj. Kaj se iu el la legantoj interesigas pri eventuala eklaboro por APO, li (aŭ ŝi) bonvolu alskribi min (Kondina 24, Beograd, Jugoslavio).

Alia grava kaj favora cirkonstanco estas, ke UEA formis Komisionon por reciproka aprezado de Orienta kaj Okcidenta kulturoj, kun kvar membroj (S-ro Norman Smith, D-ro Hideo Yagi, S-ro Jean Thierry kaj Tibor Sekelj), Komisiono kiu jam eklaboris energie kaj entuziasme por alproksimigi la diversajn mondpartojn unu al alia. Ni programas eldonon de serio de libroj, interŝanĝon de personoj; prelegistoj kaj artistoj el oriento okcidenten, kaj esperanto-informantoj, instruantoj kaj organizantoj el okcidento orienten. Tiu ĉi laboro estas des pli grava, ĉar ĝi forte apogas gravan projekton de UNESKO, en kies okuloj nia prestiĝo multe plialtiĝos per tiu agado, kiu cetere ankaŭ plene akordiĝas kun niaj esperantistaj idealoj.

Nur kelkaj personoj, kies cirkonstancoj tion permesas, povos aliĝi al APO por persone ekplugi la novajn kampojn, kiuj nin atendas en Azio. Sed multaj aliaj gesamideanoj povas apogi ilian agadon per mona kontribuo, kiun mi petas bonvole sendu kun la klara indiko "por APO" al la Centra Oficejo de UEA.

Kiel ŝanĝiĝas la tempoj! Homoj foje ekmarŝis por malkovri novajn kontinentojn, por ĉerpi el ili oron kaj spicaĵojn. Aliaj ekbatalis por konkeri tombon aŭ por disvastigi sian religion. Nun ni, la modernaj konkerantoj portas novan standardon al la malnovaj kontinentoj: tiun de la tuthoma interkompreniĝo. Sed antaŭ ni, kiel antaŭ ili, novaj horizontoj malfermiĝas.

# NOVA VENKO: ESPERANTO KIEL INSTRULINGVO

## Lernejo en Somero komencis eksperimentan instruon

Somero estas kampara komunumo en suda Finnlando. La geknaba lernejo estas posedata de la komunumo. Kiel ĉiuj neŝtataj lernejoj en Finnlando, ĝi havas ŝtatan subvencion kaj laboras laŭ instrua plano aprobita de la Instrua Administracio kaj sub ĝia kontrolo. La rektoro de la lernejo estas malnova esperantisto, ĉefdelegito de UEA en Finnlando, magistro *Joel Vilkki*. Jam antaŭ kvarona jarcento li enkondukis Esperanton kiel libervolan fakon en la lernejo, kaj antaŭ 8 jaroj, laŭ iniciato de la tiama ĉefdirektoro de la Instrua Administracio, prof. *Yrjö Ruutu*, ŝanĝis ĝin je ordinara fako, deviga en la tria klaso kun po 2 horoj semajne, kiun sekvis unu jaro de libervola daŭrigo.

La lernejo konsistas el meza lernejo (5 klasoj) kaj liceo (3 klasoj); la lernantoj, kiuj finis tiujn, rajas eniri universitaton aŭ alian altlernejon.

Pro diversaj kaŭzoj la instrua plano de la lernejo devis esti funde rearanĝata de la komenco de la ĉijara aŭtuno, kaj la pozicio de Esperanto ŝajnis minacita. Sed rektoro Vilkki faris kuraĝan taktikon: li proponis al la I.A. ke la lingva linio (apud kiu ekzistas la reala-matematika) estu dividata en du paralelajn liniojn. En la linio, kiu interesas nin, Esperanto estu la sola lingvo en la unua klaso, kun po 6 semajnaj horoj; en la dua klaso estu komencata la instruo de la unua fremda lingvo, kiun la paralela linio komencis unu jaron pli frue, kaj ambaŭ linioj do lernos ĝin ankoraŭ dum 4 jaroj paralele, ĝis la fino de la meza lernejo; tiam oni povos kompari la rezultojn. Sed por ke la lerno de Esperanto ne estu perdita post la unua jaro, dum kvar jaroj iu fako, prefere geografio aŭ eventuale historio, estu instruata en Esperanto, kaj por tiu instruo, por ke ĝi ne malhelpu la akiron de la instrua objekto, estu aldonata dum 2 jaroj po unu ĉiusemajna horo.

La plano estas nun sensanĝe aprobita en la memorinda dato la 2-a de julio 1958, kaj ĝia efektiviĝo komenciĝis en septembro de nuna jaro; la instruo de geografio aŭ historio per Esperanto unu jaron poste.

*Vilho Setälä*

## Nia Universala Ekspozicio

Por la kvara fojo estis prezentata la Universala Ekspozicio de Esperanto, en Mainz, okaze de la 43-a Universala Kongreso de Esperanto.

Denove ĝi estis grandioza sukceso.

Ĉar verŝajne la 5-a Universala Ekspozicio okazos la proksiman jaron, en Varsovio, dum la U.K., ni denove volas afable apelacii al ĉiuj esperantistaj individuoj kaj kolektivoj por alsendo de kompleta materialo.

Pro la fakto ke la U.E. okazos dum la festado de la centjara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof kaj krome en la lando de lia naskiĝo, estas tre dezirinde ke ĝi estu kiel eble plej kompleta.

Ni speciale akcentas la gravecon de la alsendo de:

Nacilingvaj lernolibroj (ĉefe la laste eldonitaj), ŝlosiloj (kiuj preskaŭ ne enestas en la materialo), vortaroj kaj fakaj terminaroj, verkoj de Zamenhof (originalaj kaj tradukitaj kaj tradukoj en naciajn lingvojn), kaj nacilingvaj tradukoj el Esperanto.

Ni ankoraŭfoje petas la eldonistojn, kiuj tion ne faris, sendi ekzempleron de ĉiuj de ili eldonitaj verkoj.

Ĉiuj eldonejoj de Esperantaj gazetoj estas petataj sendi ekzempleron de siaj eldonaĵoj.

Ankaŭ al la Esperanto-organizaĵoj ni petas alsendon de iliaj organoj.

Cetere ĉia materialo, kiu evidentigas la aplikadon de Esperanto estas bonvena.

La materialon oni sendu al: Centra Oficejo de U.E.A., Eendrachtsweg, 7, Rotterdam, Nederlando, citante: por la Universala Ekspozicio.

Plej varme dankas la bonvolon de ĉiuj alsendontoj

*J. Calado*

*Kunlaboranto de C.E.D.  
por la Universala Ekspozicio*

### „The missing link”

*Indikoj sugestas,  
ke ni eble estas  
la ero mankanta  
en vico giganta*

*de bestoj, ĝis venas la homo  
— ankoraŭ hontigas la nomo.*

*Poul Thorsen*

*„The missing link” (angle)=la mankanta (ankoraŭ netrovita) evolustadio inter bestoj kaj homoj.*





# LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al:  
Philippe Bonnard,  
119 Avenue de Choisy, Paris 13, Francujo

## KIU VOLAS ESTI JUNULARA DELEGITO?

UEA kreis institucion, kiu estas unika en la mondo: la reton de delegitoj. Delegitoj estas kvazaŭ konsuloj esperantistaj, kiuj plenumas plej diversajn servojn: Ili helpas al vojaĝantaj esperantistoj, donante al ili konsilojn pri la restado en siaj urboj kaj regionoj. Ili donas informojn pri industrio, komerco, trafiko, laborokaj studkondiĉoj, vivkutimoj, sciencaj kaj multaj aliaj demandoj.

Ĉiu membro de UEA rajtas uzi la servojn de la delegitoj. La servo mem estas senpaga, sed la uzanto devas repagi la efektivaĵojn elspezojn de la delegito.

En unu loko estas nomata ĉiam nur unu delegito kaj, laŭ neceso pluraj vicdelegitoj kaj fakdelegitoj. La vicdelegito helpas la delegiton kaj anstataŭas lin. La fakdelegito estas specialisto pri sia fako, ekzemple pri ekonomio, filatelo, instruado, juro, medicino, tekniko, turismo ktp...

La nomoj de ĉiuj delegitoj, vicdelegitoj kaj fakdelegitoj aperas ĉiujare en la oficiala jarlibro de UEA. Ili estas ordigitaj laŭ aboco ordo de la landoj kaj, en la kadro de ĉiu lando, de la lokoj; krome aparta listo de fakoj indikas, en kiu loko troviĝas fakdelegito por la koncerna fako. Tiamaniere, la adreso de kiu ajn delegito aŭ fakdelegito estas facile trovebla.

Laŭ la jarlibro 1958 (Unua parto) UEA havas nuntempe 1232 delegitojn, 209 vicdelegitojn, 1074 fakdelegitojn kaj 24 junularajn delegitojn, do entute 2539 diversajn delegitojn.

Por doni speciale porjunularajn servojn al junaj esperantistoj kaj plifirmigi la solidarecon inter ili, la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), la Junulara sekcio de UEA, organizas reton de junularaj delegitoj. Ilia tasko estas i.a.: Reprezentanti TEJO-n en siaj lokoj, helpi al vojaĝantaj gejunuloj kaj kunlabore kun la centraj instancoj akceli la internaciajn korespondadon kaj ferio-interŝanĝon de la junularo.

Jen la reguloj por fariĝi Junulara Delegito (JD):

1) Ĉiu JD bone scipovu la internacian lingvon Esperanto.

2) JD devas esti membro-abonanto de UEA, ĉar li/ŝi bezonas la jarlibron kaj la oficialan gazeton "Esperanto" kun la junulara parto "La Juna Vivo".

3) Antaŭ ol kandidati kiel JD, oni devas esti individua membro de UEA jam unu jaron.

4) JD havu minimume 18 jarojn.

5) JD estas elektata de loka sekcio aŭ nomata de landa sekcio de TEJO interkonsente kun la landa ĉefdelegito de UEA.

## SKIFERIO DE LA ESPERANTO-JUNULARO DE SVISLANDO

26-a de decembro 1958 ĝis la 4-a de januaro 1959

en Adelboden, 1400 metrojn alta skistacio en la svisaj Alpoj

Ĉar la skirestadoj de la pasintaj vintroj majstre sukcesis, ni decidis rekomenci tiun jaron. Jen kiel ni vivos:

Modesta ĉaledo (alpa lignodomo) atendas nin. Junuloj dormos sur pajlomatracoj, junulinoj ricevas litojn. Lerta kuiristino-instruistino pretigos niajn manĝaĵojn; sed ĉiuj kunhelpos en la interna doma laboro.

Aĝo:

de 16 jaroj ĝis 30 jaroj.

Prezo:

90 svisaj frankoj. Ĉio estas enalkulita: loĝado, manĝaĵoj, asekuro kontraŭ akcidentoj, 2 skiekskursoj, skikurso por komencantoj, Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresintoj.

Aliĝo:

Partoprenantoj, bonvolu kiel eble plej baldaŭ anonci letere vian partoprenon kun viaj nomo, antaŭnomo, preciza adreso, naskiĝdato, pasportnumero (tiuj lastaj indikoj estas necesaj por la asekuro). Sciigu ankaŭ ĉu vi estas skilernanto aŭ progresinto. Se vi deziras lupreni skiojn, menciu vian grandecon!

Samtempe kun la aliĝilo sendu la antaŭpagon de sv. fr. 25.— (poŝtĝir-konto: IV 6151, Gacond, La Sagne/NE, Svislando).

Aliĝo sen antaŭpago ne validas.

La antaŭpago ne estas repagebla, ĉe se la aliĝinto ne venas.

Informoj:

Petante pliajn informojn, bonvolu kunsendi internacian respondkuponon.

Atentu:

Ĉar la nombro de la partoprenantoj estas limigita kaj nia domo ne elasta, tuj aliĝu kaj ne hezitu ĝis kiam ĉiuj lokoj estas okupitaj. Ne estas eble partopreni nur parton de la skirestado.

Aliĝadreso:

Andrée Gacond, Crêt 78, La Sagne/NE, Svislando.

La organizanto:

ESPERANTO-JUNULARO DE SVISLANDO

## "UNUIĜINTAJ NACIOJ" INTERNACIA SEMINARIO DE GERMANA ESPERANTO-JUNULARO

Pro la bona sukceso de la pasintjara seminario en Mainz, la Federacia Estraro de Germana Esperanto-Junularo aranĝos inter Kristnasko kaj Novjaro novan seminarion, al kiu estas kore invitataj la junaj esperantistoj tutmondaj.

Jen la unuaj informoj:

Loko:

Junulargastejo en Bottrop/Vestfaliao.

Tempo:

De la 27-a de decembro 1958 ĝis la 2-a de januaro 1959; la malfermo okazos la 27-an de decembro vespere, la fermo la 2-an de januaro tagmeze.

Programo:

Ĉefa temo estos la "Unuiĝintaj Nacioj", pri kies laboro kaj problemoj prelegos eminentaj esperantistoj diverslandaj; krome okazos publika diskutado pri la Esperantista Junularo, filmprezentoj, silvestra balo kaj aliaj tre plaĉaj aranĝoj.

Prezo:

Pro ŝtata subvencio la prezo (inkluzivanta loĝadon kaj ĉiujn manĝojn) estos nur 35 germanaj markoj por partoprenant(in)oj malpli ol 25-jaraj kaj 40-GM por pli ol 25-jaraj. Parto de la vojaĝkostoj sur la linioj de la Germana Federacia Fervojararo (ĝenerale 50%) estos repagata.

Aliĝo:

Ĝis la 1-a de decembro 1958 al Germana Esperanto-Junularo, T 6/18 Mannheim, Germanujo, kun indikoj pri nomo, antaŭnomo, preciza adreso, naskiĝdato kaj profesio. Ĉar la nombro de la gepartoprenantoj estas limigita al 50, baldaŭa aliĝo estas necesa.

Ĉiujn informojn kaj artikolojn aperi rontajn en "La Juna Vivo" bonvolu sendi en du ekzempleroj tajpitaj se eble.

Antaŭdankon!

La Redaktoro

## LA 17-A REGULO

D-ro Zamenhof, la aŭtoro far Esperanto, prezentis koncize la Fundamentan Gramatikon en la konataj 16 reguloj, kaj la Fundamenta Gramatiko kiel parto de la Fundamento de Esperanto estas akceptita de la 1-a Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer en 1905.

Sendube oni memoras jenajn vortojn de la 4-a paragrafo de la Bulonja Deklaracio:

"La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo "Fundamento de Esperanto" .... Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en "Fundamento de Esperanto", ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta...."

Kelkfoje oni trovas manko tion, ke tiu rajto pri libera elekto de esprimmanieroj ne estas limigita per 17-a regulo: ke tiuj esprimmanieroj estu inter si konformaj. Por ilustrati mian aserton mi donos kiel ekzemplon verbigon de prepozicioj kaj inverse prepoziciigon de verboj.

Kiam en frua esperantisteco mi

unufoje renkontis la vortojn *peri* kaj *peranto*, estis por mi treege malfacile kompreni ilian signifon en la kunteksto, ĉar mi analizis ilin analoge al ekzemple *anstataŭi* kaj *anstataŭanto*.

Vidu: *anstataŭi kolegon* signifas esti, troviĝi, situi, agi, funkcii, labori k.t.p. *anstataŭ kolego*, kaj en simila maniero oni povas analizi la aliajn verbigitajn prepoziciojn de loko: *antaŭi*, *ĉirkaŭi*, *kontraŭi*, *superi* k.t.p. Supozante, ke pro la simpleco kaj logikeco de la lingvo ankaŭ *peri* oni povas analizi laŭ sama skemo mi opiniis, ke la vorto signifas *agi per* aŭ alivorte *uzi, apliki, utiligi*. Laŭ tio do *peranto* signifus *uzanto*.

Iom post iom mi en legado kutimiĝis al la fakta signifo de la vortoj (*havigi* respektive *agento*), sed la nekonformeco ĉiam ankoraŭ ĝenas min tiel, ke mi evitas uzi ilin ekster citoj. Plej ĝenas min la konstato, ke laŭ Plena Vortaro tiu lingvouzo estas eĉ zamenhofa (*peri al iu oficon*)!

Sed per tio ne estas finita la domaĝo. Oni komencis rezoni jene: Se el prepozicioj kiel *antaŭi* kaj *per* oni povas fari verbojn per aldonado de verba finaĵo, oni povu

ankaŭ el verboj fari prepoziciojn per forigo de la verba finaĵo. Tiel oni laŭ la skemo *peri* — *per* kreis la prepozicion *far* signifantan do ekzemple *farita de*, same nekonforman al la aliaj prepozicioj kaj simile komplikigantan nian lingvon. Lastfoje mi vidis tian uzon de *far* en ĉi tiu revuo, n-ro 626 (1), jan. 1958, p. 9, meza kolono: ... *la Antaŭparolo de la libro far la eminenta pola sociologo*....

Mi ne volas forte kontraŭi la argumenton, ke *peri* estas zamenhofa kaj tiel enradikiĝinta, ke nun oni devas toleri ĝin kiel escepton, sed tio estu: kiel solan escepton! Mi ankaŭ ne neas, ke ofte estas forte sentata la bezono de speciala prepozicio (anstataŭ la vasta *de*) por montri aganton, sed *far* ŝajnas al mi pro la supre menciitaj konsideroj netaŭga por tiu uzo.

Do, se anstataŭ *arbaro ĉirkaŭanta lagon* oni povas diri *arbaro ĉirkaŭ lago*, oni povu analoge anstataŭ *aŭtoro farinta verkon* diri *aŭtoro far verko*, uzo kontraŭa al la supra ekzemplo el antaŭa numero de ĉi tiu revuo, sed konforma al tiu en la unua frazo de tiu ĉi artikolo, *la aŭtoro far Esperanto*, esprimo respektanta "la 17-an regulon".

HVR

### La internaciaj konkursoj 1958

Stato je la 30-a de septembro

14.	Finnlando	2765	1915	69.26
15.	Italujo	4030	2755	68.36
16.	Jugoslavio	3800	2140	56.32

#### Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Pollando	6150	6505	105.77
2.	Brazilo	7011	7395	105.47
3.	Germanujo	6865	6496	94.62
4.	Svedujo	6945	6400	92.15
5.	Nederlando	5567	5079	91.23
6.	Francujo	7647	6890	90.10
7.	Britujo	6963	6050	86.87
8.	Usono	3225	2680	83.10
9.	Danlando	2743	2278	83.05
10.	Hispanujo	2508	1989	79.31
11.	Svislando	2185	1705	78.03
12.	Belgujo	1907	1437	75.35
13.	Norvegujo	2144	1581	73.74

#### Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Portugalujo	560	615	109.82
2.	Aŭstralio	1228	1275	103.82
3.	Izraelo	240	240	100.—
4.	Kanado	440	430	97.73
5.	Sudafriko	235	215	91.49
6.	Japanujo	1280	1150	89.84
7.	Aŭstrujo	1505	1345	89.37
8.	Novzelando	955	835	87.43
9.	Islando	315	270	85.71
10.	Maroko	659	457	69.35
11.	Urugvajo	414	275	66.43
12.	Argentino	1005	615	61.19

# Belartaj Konkursoj 1958

Branĉo: Originala Poezio

Unua Premio

## Kantiko por mia Kreitaĵo

Laŭdata Vi estu, Sinjoro,  
pro dolĉa de mi kreitaĵo.  
Mi estis frostigita nuda roko  
sen plu animo, senmova ŝtonaro;  
kaj Vi, Sinjoro, faris Vi, ke kantu  
la roko kaj la ŝtonoj  
kaj la abismo.

Laŭdata Vi estu, Sinjoro,  
pro dolĉa de mi kreitaĵo :  
pro larmoj ĉe lulilo,  
pro kuna restado, ni duo,  
duopo soleca dum tiom  
da noktoj : duba brilo  
de la konsumiĝanta kandeletto  
kaj hezitema kanto de patrino  
ploranta en sekreto.

Laŭdata Vi estu, Sinjoro,  
pro lia rigardo, per kiu

Vin vidas mi; pro lia buŝo  
ankoraŭ malcerta, pro liaj  
florsimilaj manetoj  
senhalte, febre al malkovro pretaj;  
pro la kvin etaj buloj ĉe la fino

de belforma piedo,  
pro la tuta korpeto,  
fleksebla junko, nekredebla parto  
el mia propra karno.

Laŭdata Vi estu, Sinjoro,  
pro nemortebila animeto pura,  
barakte aperanta  
tra la malhelpoj de tro eta aĝo;  
de la malbon' Vi gardu ĝin sekura.

Laŭdata estu Vi pro la vesperoj  
sublimaj, kiam pene  
mi dekroĉas de mi, por lin fordoni

al mistero de l' dormo, mian filon  
kiel al vento mi delasas bulon  
sapan, kaj plu ne konas  
ĝian vagadon tra ĉiela vasto.

Laŭdata Vi estu, Sinjoro,  
pro rido kaj ploro,  
pro pluvo kaj vento,  
nebulo kaj suna momento,  
glimeroj de akvo  
tra liaj fingretoj,  
kaj flagroj de gajeco  
sub serena brovarko;  
pro delikataj stampoj  
de kurantaj sur sablo  
arĝenta piedetoj;  
pro la etaj koleroj  
subite eksplodantaj,  
kaj ve!, pro nedirebla  
zono de rozaj brakoj,  
kiu forviŝas ĉiun temposignon,  
momento kiam nenio ekzistas  
krom lia esto.

Vi laŭdu kaj vi danku la Sinjoron;  
mi ne sufiĉas, mia voĉ' mizera  
perdiĝas en senfinon  
de mia kreitaĵo.

Sino Clelia Conterno Guglielminetti  
Torino, Italujo

Branĉo: Originala Prozo

## ARANEO

al Julio Baghy

Johan Hammond Rosbach

Unua Premio

Kia ĉefurbo! Moderna, vigla, belega, sed ja kun  
tiu agrabla provincurba trankvilo, kies ĉarmo  
altiras al si ĉefurbanojn. . . . .

Mi sidas sur la teraso de bona hotelo, legante  
gazeton. Sed la gazeto ne sukcesas min kapti.  
Denove kaj denove mi ekpensas pri la katedralo,  
pri la kasematoj, pri la bluuniforma orkestro en  
la parko, pri la Adolfponto, — pri kio ankoraŭ?  
Mi rigardas la pejzaĝon antaŭ miaj okuloj — la  
hotelo situas en Oberstadt, sed tie, sube, mi povas

vidi ankaŭ parton de Unterstadt.

Io subite faras nigran punkton en la bela vidaĵo :  
granda araneo elegante mallevas sin per nevide-  
bla fadeneto, kaj haltas en la aero ĝuste antaŭ  
miaj okuloj.

"Gi estas vere grandega," diras subite voĉo apud  
mi. Rapide mi turnas la kapon kaj ekvidas  
sinjoron. Estas la sama sinjoro, kiu la antaŭan  
tagon montris al mi la vojon al la grandduka  
palaco.

## "LA LABORANTA REĜO"

Angla originalo, "The Working Monarch"  
de W. S. Gilbert

W. S. Gilbert (1836—1911) famiĝis pro sia kunlaboro kun la komponisto Arthur Sullivan en komikoperoj kiuj ridindigis la kapricajn modojn de la tempo. En "The Gondoliers", du respublikemaj veniciaj gondolistoj trovas sin kunregantoj de fora lando. Ili altigas la rangojn de ĉiuj ĝis, fine, ili devas mem laboregi.

Leviĝinte frumatene  
Fari fajron en la forn',  
Ni nin baldaŭ metas ene  
de labora uniform'  
Kaj komencas sen prokrast'  
Je la ĉiutaga task'.

La depeŝojn ni kontrolas  
Ilin sendas ĉar ni volas  
Superruzi politikon de fremdul'.  
Aŭ se estas tempo-spaco  
Ni "akceptas" ĉe l' palaco,  
Aŭ subskribas novan leĝon, laŭ regul',  
Aŭ inspektas soldataron de la land'  
Kun kutimaj kriegaĉoj de komand',  
Aŭ ĉeestas la solenojn de la ŝtat'  
Al grava orienta diplomat'.  
Posta task' kutimas esti  
La serviston nian vesti;  
Iom ĝenas nin la devo  
Ĉar li estas plendemul'.  
La leterojn ni cerbumas  
Ĉar malbone literumas  
La sekretari' privata  
Volas esti ni helpul'.  
Tiam faras ni aranĝon  
Kiam havu ni tagmanĝon  
Aŭ poluras juvelaron  
Kiun portos la Kronat'.  
Ordigetis ni dum horo  
Vestojn de la kortsinjoroj,  
Aŭ ni faras aferetojn  
Por Ministroj de la Ŝtat'.

Ho, filozofoj kantu pri  
Reĝaj ĝenoj. Diras ni,  
Estas grandaj privilegioj  
Kaj plezuroj pro regad'.  
Sed la privilegi' plej pura  
Kaj plezuro grandmezura

Estas fari aferetojn  
Por Ministroj de la Ŝtat'.  
Kaj post lunĉo tre malvea  
De kuket' kaj trink' ŝerea,  
Se ne restas ia urĝa ĉeflabor',  
Ni subskribas la proklamojn  
Aŭ ricevas civitanojn  
Aŭ ni kreas novan Lordon, laŭ favor'.  
Ni helpas per donaco de orden'  
Al homo dum la vivovoja pen';  
Aŭ nin vestas neformale por promen'  
Al iu granda festo aŭ festen'.  
Tuj poste ni sen laco  
Gardostaras ĉe l' palaco  
Marŝas tien marŝas reen  
Sur malgranda tero-pec'  
Dum la vera sentinelo  
Por bier' kaj ina belo  
Iras serĉi, kaj plej ofte  
Trovas en la proksimec'.  
Li revenas, laŭ kapablo  
Kaj ni tuj pretigas tablon,  
Tiam manĝas, servas kafon,  
Kaj je la unua hor',  
Iras ni al hejm' mansarda  
Kun plezuro vere arda  
Kaj kontento pro la faro  
De la devo kaj labor'.

Ho, filozofoj kantu pri  
Reĝaj ĝenoj sed, al ni,  
La plezuroj estas multaj  
Kaj la ĝenoj restas for.  
Al ni donas la plezuron  
La plej puran, grandmezuran,  
La kontento pri la faro  
De la devo kaj labor'.

Publikigita laŭ aranĝo kun la  
posedanto de la kopirajto.

---

Li eksidas. "Mi dezirus," li diras, "ke mia kvarjara filo povu vidi ĉi tiun eksterordinaran aranĝon!"

"Ĉu li interesiĝas speciale pri araneoj?" mi demandas.

La sinjoro ridas. "Vi scias, ke infanoj interesiĝas pri ĉio. Ĉu vi havas infanojn, sinjoro?"

Mi jesas.

"Tiam, sinjoro, vi eble permesas, ke mi rakontu al vi epizodon, kiu okazis antaŭ kelkaj semajnoj en mia hejmo. Mi sidis ĉe la lito de mia filo. Li ankoraŭ ne ekdormis. Infanpsikologoj instruas, ke la infano estu lasata sola en la lito, en malhela ĉambro, oni ne restu apud la lito, oni ne kantu

lulkantojn. Pri lulkantoj cetere aŭdiĝas diversaj opinioj, ĉar iuj opinias, ke la lulkantado inokulas ĉe la infano komprenon kaj ŝaton de muziko.

La bubo ne volis dormi. Laŭprograme li devus jam dormi du horojn, sed tiun vesperon li estis tiel vigla, ke mi trovis oportune permesi al li, ke li daŭrigu sian ludadon, ĝis li laciĝos. Sed li ne laciĝis, kaj post mallonga, sed forta batalo mi venkis, kaj li devis kuŝi en la lito.

Laca li tamen ne estis, kvankam liaj okuloj estis malsekaj kaj doloraj pro dormemo. Mi prenis romanon de Dickson Carr por legi ĝin, dum mi sidis ĉe lia lito, tenante unu manon lian. Tre obee li kuŝis tie, sed nur fiksrigardis la plafonon, obstine nevolis dormi. De tempo al tempo mi ĵetis rigardon al li, de tempo al tempo mi diris, ke li fermu la okulojn — sed li ĉiam respondis nur, ke li ne estas laca, li ne bezonas ankoraŭ dormi.

Mi estis leginta jam preskaŭ okdek paĝojn, kiam mi diris al li, ke mi tuj estingos la lumon. Kompreneble li devas ĉiam ekdormi en mallumo, sed tiun vesperon mi konsentis, ke la lampo lumu. Nur tiel mi venkis en la piĵama batalo.

Al infano oni ne faru minacon por poste ne efektiviĝi ĝin. Tial mi finlegis la tre streĉan ĉapitron pri la tri ĉerkoj, kaj rezigne mallumigis. Mi ne ŝatis la situacion. Ankaŭ mia filo ne ŝatis ĝin. Ĉio estas pli interesa ol mallumo, kiam oni ne volas dormi. Nur la reagoj estas diversaj. Dum mi silentis, la etulo ekkriegis por demonstracii.

Kion fari? Kompreneble mi povus timigi lin. Mi povus diri, ke araneo venos per maldika fadeno de la plafono por penetri en lian malfermitan buŝon. Tio certe fermus la buŝon kaj ĉesigus la kriadon, tiun kriadon, kiu ankaŭ ĝenas la najbarojn kaj donas al ili la falsan impreson, ke mi ne regas mian propran filon. Sed tia procedo kreas kompleksojn — li estus por ĉiam timonta araneojn, se mi ion tian dirus.

Tamen la araneo donis al mi la ideon, ke mi rakontu al li pri la araneo. La ideo cetere ne estis nova, nek mia, ĉar mia edzino rakontis al li pri la araneo la antaŭan tagon. Nu, tre drame kaj tre romantike mi rakontis pri la reto, per kiu la besto kaptas muŝojn. Kaj mi rakontis, ke la araneo havas eĉ ses piedojn.

"Kial havas la araneo ses piedojn?"

Anstataŭ respondi, mi proponis, ke mi kantu por li Mi apartenas al tiuj, kiuj defendas la lulkantadon. Sed bedaŭrinde mi konas eĉ ne unu lulkanton. Do mi kantis kelkajn mallongajn kantojn, post kio mi kantis cent strofojn de kanto, kiu havas nur kvar. Miaj kantiloj estis tre lacaj, kiam li rekompençe petis min ĉesigi la hurladon, ĉar li volas dormi...."

"La kondiĉo de la patro, ĉu ne?" mi ridete diris. La sinjoro nur kapjesis, kaj tuj daŭrigis:

"Jes, sed oni ja ĝoje oferas, se oni oferas por sia infano. Ĉifoje mi cetere preskaŭ ĝojis pro la rezig-

niga situacio, ĉar mi vere ne povis plu kanti. Mi sidis. Nur sidis.

Tiam subite la porda sonorilo laŭtis. Mi devis mem malfermi, ĉar mia edzino ĝuste tiun vesperon estis for. Kiam mi revenis al la lito de la knabo, li sidis sur sia kuseno, postulante, ke mi diru al li, kiu sonorigis, kion li deziras, kial li vekis lin, kial mi bezonis malfermi al li, ĉu li ne povus atendi ĝis morgaŭ, kaj kial li ne povis atendi.

Mi rigardis la horloĝon. Preskaŭ du horojn mi jam sidis ĉe lia lito. La tempon oni efektive povas pli bone utiligi. Ekzemple en fotelo kun romano de Dickson Carr.

Paĉjo, donu al mi lakton!"

Mi obee iris en la kuirejon. La infano ricevis sian lakton. Oni ne rifuzu al infano la lakton, kiun li bezonas.

"Ĉu vi volas dormi nun?"

"Jes, paĉjo, bonan nokton!"

"Bonan nokton, knabo mia!"

"Sed paĉjo, vi devas sidi ĉe mi!"

Dek minutoj pasis en profunda silento. Dickson Carr brulis en miaj manoj. Mi senbrue ekstaris, ekiris. Tuj li estis maldorma.

"Paĉjo, kien vi iras?"

"En la necesejon."

"Ĉu vi revenos?"

"Jes, certe."

Mi iris al mia fotelo. Mi retrovis mian ĉapitron.

"Paĉjo, ĉu vi ne revenos baldaŭ?"

Rapidege mi reiris al la fileto.

"Dormu nun!"

"Jes, paĉjo. Sed paĉjo, mi deziras panon."

Kion fari? Ĉu doni al li la panon? Aŭ ĉu mi risku novan kriadon pro rifuzo? Kiom ajn mi pensis pri la problemo, mi ne trovis la ĝustan solvon. Mi decidis rifuzi al li la panon.

"Morgaŭ, knabeto, vi ricevos vian panon. Estas ja nun nokto, kaj la homoj ne manĝas nokte. Nur la araneoj manĝas nokte."

"Jes, paĉjo, bonan nokton!"

"Bonan nokton!"

Elspiris mi pro kontento. La knabo vere metis la kapon sur la kusenon kaj dormis. Mi atendis kelkajn minutojn por esti tute certa. Fine mi demandis, ĉu mi nun povas iri, kaj ĉar li ne respondis, mi komprenis, ke li fine dormas.

En la fotelo mi meditis kelkajn minutojn, antaŭ ol malfermi la romanon. Tio estas la feliĉo. Oferti ion por la infanoj. Tio estas la ideo mem de la vivo. Kaj ĉu mi nun bedaŭras la du horojn kaj dek minutojn ĉe lia lito? Neniel! Ĉar tre baldaŭ li ne plu estos malgranda knabo. Kaj kiu demandu tiam, kial la araneo havas ses piedojn?

Mi eklegis. Mi absorbiĝis per la streĉa legado.

Sed subite aŭdiĝis konata sono. Du nudaj infanaj piedoj klaketis sur la planko.

"Sed, paĉjo, vi diris, ke la araneo havas ses piedojn, kaj panjo diris, ke ĝi havas ok piedojn."

"Do, ni serĉu en nia libro!"

Kaj ni trovis, ke la araneo havas ok piedojn. La knabeto kontente reiris al sia lito, kaj momenton poste, kiam mi rigardis lin, li jam denove dormis.

Kompreneble oni devus ĉion scii, por ne doni al sia filo la impreson, ke oni nenion scias. Sed mi ja ne estas zoologo. . . . ."

Mi restas sidante sur la teraso, post kiam la sinjoro foriris kune kun sia edzino. Ili volis ankoraŭ promeni en la bela urbo Luxembourg.

Mi demandas al kelnero, kiu estas la sinjoro, kun kiu mi ĵus parolis.

"Vi ne scias, sinjoro? Tio estas sinjoro Mott, la fama infansikologo."



En Glinde — situante proksime al Hamburg — la esperantistoj sukcesis instigi la urbajn instancojn doni al strato Esperantan nomon.

## Magnetofona Servo de U.E.A.

Komisiito: Rüdiger Eichholz ĉe Esperanto Press  
Oakville, Ont., Kanado

### Tria listo de haveblaj sonbendoj:

- |    |   |   |    |
|----|---|---|----|
| 17 | P E. J. Weber: 'La internacia paco kaj nia pensmaniero'. (Parolado ĉe la 23-a kongreso de Novzelanda Esperanto Asocio, decembro 1957) mez     | 1 | 40 |
| 18 | P E. J. Weber: 'Pledo por parola uzo de Esperanto'. . . . .   | 1 | 10 |
| 19 | P Prof. E. Privat: 'Pacaj metodoj de interŝtata kunvivado'. (4 radio prelegetoj de la Svisa Radio surbendigitaj por la Magnetofona Servo) rap | 1 | 20 |
| 20 | P D-ro A. Baur: 'La kvara nacia lingvo de Svislando'. (La Romanĉa lingvo) (Surbendigita de la Svisa Radio por la Magnetofona Servo) rap       | 1 | 15 |
| 21 | P D-ro A. Baur: 'La persono de Heinrich Pestalozzi'. (Surbendigo de la Svisa Radio) . . . . .   | 1 | 5  |

Novaj prezoj por sonbendmaterialo: Bobeno kun

- |                      |   |
|----------------------|---|
| 1200 futoj = 366 m : | \$ 2,90 (2 horoj ĉe rapideco C kaj duvoja uzo)    |
| 600 futoj = 183 m :  | \$ 1,85 (1 horo ĉe rapideco C kaj duvoja uzo)     |
| 150 futoj = 45 m :   | \$ 0,75 (15 minutoj ĉe rapideco C kaj duvoja uzo) |

Pago por kopilaboro: \$ 1,00 por 30 minutoj da kopiado.

Neniuj pagoj por kopilaboro, se la ensendata programo povas esti akceptata por la arĥivo de la Magnetofona Servo.

## Korekto

Prof. Edmond Privat petis publikigon de jenaj korektoj de eraroj en la referaĵoj pri liaj paroladoj en la U.K. en Mainz:

- 1) Hector Hodler bedaŭrinde ne partoprenis la Bulonjan Kongreson.
- 2) La junulo, kiu venis helpi Hodler estis s-ro Hans Jacob. La financojn gvidis s-ro Ed. Stettler, kiu poste prezidis UEA.

3) William Penn ne "defendis la rajtojn de la Puritanoj", sed de ĉiuj religiaj grupoj persekutataj, inkluzive de romaj katolikoj.

Tiu eraro jam aperis en la Kongresa Libro, kaj mi atentigis pri ĝi. Kiam la Puritanoj regis, ili ne estis same tolerantaj kiel li.

La Kvakeroj spertis tion en Nordameriko. Lia propono pri Eŭropa Unuiĝo ne okazis "antaŭ du cent jaroj", sed antaŭ tri, precize en 1692.

## Tra la mondo

● **ILEI-observanto en instruista mondkongreso en Romo.** De la 31/7 ĝis la 7/8 okazis en Romo kongreso de la Monda Federacio de Instruistaj Organizaĵoj, kiu estis invitinta la Internacian Ligon de Esperantistaj Instruistoj sendi observanton. La observanto estis prof. F. Fresco el Romo, kiu per la helpo de s-ro Birger Nordstrand, membro de la administra komitato kaj esperantisto, akiris permeson meti sur la dokumentablon ekzemplerojn de la simpligita teksto en Esperanto de la Universala Deklaro pri Homrajtoj farita de ILEI por geinstruistoj.

● **Polaj esperantistaj fervojistoj organizas sin.** En Gdansk okazis la fondo de Pola Fervojista Esperanta Federacio kiel sekcio de la Asocio de Esperantistoj en Pollando. La sekcio intencas aliĝi al Internacia Federacio Esperantista Fervojista, tuj kiam la membronombraro ebligos tion.

● **Novaj japanaj glumarkoj kaj poŝtstampo Esperantaj.** La 45-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazos dum la unuaj 3 tagoj de novembro en Fukuoka. Atentige pri tio kaj memorige pri la 100 jaroj de D-ro Zamenhof estas eldonitaj trikolore presitaj glumarkoj de Orienta Societo de Esperanta Filatelo (451 Sakaeĉi, Niŝi, Amagasaki), kiu prizorgas ankaŭ, okaze de la kongreso, memorigajn poŝtkartojn kaj kovertojn kun speciala poŝtstampo.

● **Klubo de Amikoj.** La pola gazeto "Kulisy" publikigas esperanto-angulon sub la gvidado de s-ro Mgr. Miecyslaw Zgórzewski. La redakcio de tiu grava gazeto kun eldonkvanto de 300.000 konsentis pligrandigi la rubrikon, kondiĉe ke la prezentata materialo estu interesa. Tial la redaktoro de la fako petas la esperantistojn el la tuta mondo alsendi interesajn informojn, mallongajn artikolojn kaj anoncojn por korespondado. Bv. sendi ĉion al Mgr. Miecyslaw Zgórzewski, Wroclaw 2, skr. poct. 22, Pollando.

# BELARTA KONKURSO 1959

Ni invitas niajn verkistojn konkuri en la Belarta Konkurso, 1959. En ĉi tiu konkurso, la deka en la serio, ni iniciatas specialan premion, kiu celas kuraĝigi novajn talentojn. Nome, la komisiono aljuĝos diplomon kaj monpremion de 4 us. dolaroj al tiu persono, kiu (laŭ la opinio de la komisiono) sendos la plej bonan verkon de verkisto premiita nek en ĉi tiu konkurso, nek en iu el la naŭ antaŭaj konkursoj.

## LITERATURA SEKCIO:

1. *Originala poezio* (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj).
2. *Tradukita poezio* (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj).
3. *Originala prozo* (novelo, eseo, artikolo, aŭ simile; ĉiu prozaĵo po 2.000-3.000 vortoj).
4. *Originala drameto* (ĉu por sceneja prezento, ĉu en formo de radia dialogo; maksimuma ludodaŭro, 25 minutoj).
5. *Kongreslanda branĉo* (tasko poste anoncota).

Internacia komisiono juĝos la verkojn. La proklamo de la rezultoj okazos en tiucela kunveno dum la 44-a Universala Kongreso en Varsovio, kaj en la sama kunveno oni laŭtleĝos el la premiitaj verkoj. Ĉiu premiito ricevos diplomon kaj ankaŭ monpremion laŭ jena tabelo: unua premio, 14 us. dol. dua premio, 7 us. dol., tria premio, 3,50 us. dol. Ĉiu premiito rajtas akcepti librojn el la librolisto

de UEA ĝis la valoro de sia premio, se dezirate.

## ĜENERALAJ REGULOJ POR PARTOPRENO:

1. Ĉiu rajtas konkursi, kiu aliĝis al la 44-a Universala Kongreso aŭ kiu estas individua membro de UEA (ĉu rekte, ĉu per "adopto").

2. La konkursa kotizo (sendepende, ĉu oni sendas nur unu aŭ plurajn konkursaĵojn por unu aŭ pluraj branĉoj): por britoj, 1 ŝilingo, 6 pencoj. En aliaj landoj, de kie oni rajtas sendi respondkuponojn: 3 respondkuponoj maldekstre stampitaj de la poŝto (bonvolu kontroli tion) aŭ malpli, laŭ la enlanda permeso. Por landoj, kie la sendo de respondkuponoj estas malpermesita, la partopreno estas senpaga.

3. Oni rajtas konkursi per maksimume tri (antaŭe en presformo ne aperintaj) verkoj en ĉiu branĉo. Ĉe la traduka branĉo oni zorgu eventuale pri la represa rajto. La premiitaj verkoj laŭeble aperos en la revuo "Esperanto" kaj sen la permeso de la redaktoro de tiu organo oni ne rajtas antaŭe aperigi ilin en alia gazeto.

4. La konkursaĵoj estu laŭeble maŝinskribitaj. Oni sendu 4 ekzemplerojn de ĉiu konkursaĵo kaj en la traduka branĉo ankaŭ 4 ekzemplerojn de la originalo. Oni skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon, kiu efike kaŝas la identecon de la aŭtoro, kaj kiu ne estas, ekz., anagramo de la vera nomo. Oni skribu sian nomon kaj adreson sur aparta slipo, sur kiu oni ankaŭ skribu sian kongresnumeron aŭ surgluu membromarkon de UEA, por montri konformon al regulo 1.

5. Oni sendu ĉion: konkursaĵojn, slipon, eventuale respondkuponojn, ktp., al la Peranto de la Belarta Konkurso: S-ro Albert V. King, 20 Lodore Road, Fishponds, Bristol, Anglujo.

La limdato por la ricevo de la konkursaĵoj estas la 3-a de majo, 1959.

Gerald C. Jervis, Sekretario.

## RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj, vidu la oktobran numeron.

**Radio Wien** nun elsendas per ondoj 513 m. (584 kcs), 293 m. (1025 kcs), 48 m., 41 m., 30 m., 25 m., 16 m., 11 m. Tago kaj horo ne ŝanĝitaj.

**Radio Roma.** 4-XI, Salenta duoninsulo; 7-XI, Itala komponisto Donizetti; 11-XI, Novajoj el Italujo; 14-XI, Leterkesto kaj bibliografio; 18-XI, Italaj kanzonoj en Esperanto; 21-XI, Romo kaj fremda verkisto Chateaubriand; 25-XI, Granda sanktulo Bonaventura; 28-XI, Itala belarta urbo Reggio Calabria; krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. Prelegantoj: D-ro Vincenzo Musella kaj s-ro Luigi Minnaja.

**Radio Zagreb.** 6-XI, Junularo parolas; 13-XI, Jugoslava mozaiko; 20-XI, Radiodramo; 27-XI, Primovadaj novaĵoj kaj respondoj al korespondantoj; 4-XII, Divenu!; 11-XII, Zamenhofa festo; la tago de homaj rajtoj.

## NOVA LIBRO

*LA SEĜO DEKTRIA\** de George E. Wagner. Eld. Esperanto Library, Middleton, Wis., Usono, 1957. 40 p. broŝ. 14,5 x 20 cm. Kun portreto de la aŭtoro. Varitaj pe presita. Prezo neindikita.

Instigis la aŭtoron al verkado de ĉi tiu interesa rakonto la tute ĝusta ideo, ke Esperanto ne havas sufiĉe da originalaĵoj; kaj kuraĝigis lin la penso, egale ĝusta, ke ne necesas, ke la originalaĵo estu ĉefverko. Ankaŭ Es-

peranto bezonas tiajn librojn, kiuj bone troviĝas en la stacidomaj kioskoj por provizi distron dum vojaĝo. La aŭtoro ne celis pli alten; sed tiun celon li bone trafis.

Kio ja necesas, estas, ke la lingvaĵo estu bona. Bonŝance, ankaŭ ĉi tie la aŭtoro trafis; mi preskaŭ dirus, ke la stilo superas la rakonton. Nur ĉe 3/2 mi preferus vidi "rigardante" kaj simile ĉe 16/9 mi savus la gramatikon enmetante "kaj" antaŭ "doninta". Tri anglismoj iom ĝenas: 11/7 *simpatias kun* (*kompatas* aŭ *kusentas kun*); 17/6

kaj 28/15 *pruvas esti* (*montriĝas*); 19/4 *sin vindas* (*sin tordas*).

Espereble la libreto tiel bone vendiĝos, ke la aŭtoro povos plenumi sian promeson, verki aliajn similajn.

D. B. Gregor

## ESPERANTISTA VIVO

### NASKIĜO

**Ronald.** Ges-roj U. Paul Ronald, Roxboro, Kanado, anoncis naskiĝon de filino, fratino por Lola kaj Pauline.

### GEFIANĈIĜO

**Kaesar-Veramo.** Gefianĉiĝis f-ino Pirjo Veramo el Ikaalinen, Finnlando, kaj s-ro Knut Albrecht Kaeser el Düsseldorf, Germanujo.

### NEKROLOGO

**Gemeinhardt.** La 9-an de julio mortis 56-jara Ernst Gemeinhardt en Nürnberg, Germanujo. Li estis esperantisto de multaj jaroj kaj UEA-membro.

**Martins da Cruz.** La 10-an de julio mortis en Benguela, Angolo (Portugala Okcidenta Afriko), D-ro Amilcar Barca Martins da Cruz en la aĝo de 77 jaroj. Li estis advokato kaj FD de UEA, veterana esperantisto, kiu ĉiam agadis por nia movado, ankaŭ per la gazetaro kaj radio.

## LETEROJ AL LA REDAKCIO:

Varsovio, la 29-an de septembro  
1958

Kun granda ĝojo kaj kontentigo mi tralegis en "Esperanto" N-ro 9, 1958 seriozan, vastan kaj ampleksan programon de la aranĝoj kaj solenaĵoj okaze de la Zamenhofa Jaro. Mia ĝojo estas des pli granda, ĉar mi dum la kunsido de la Internacia Komitato en Marsejlo proponis festi per konformaj aranĝoj la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof. (Vidu "Esperanto", n-ro 1, 1958).

La publikigita programo i.a. antaŭvidas disvastigon de bibliografijaj verkoj pri Zamenhof.

Do, mi informas, ke pola literaturistino, Maria Ziółkowska, verkis libron, titolitan "Doktoro Esperanto", kiu prezentas en beletra formo la vivon de la kreinto de la Internacia lingvo. La verkistino, kiu speciale ellernis Esperanton bazis la verkon sur: "Galerio de Zamenhofoj", "Vivo de Zamenhof", "Originala Verkaro", "Leteroj de Zamenhof", "La lastaj tagoj" kaj aliaj haveblaj materialoj. La libro estas presota paralele en du lingvoj: pola kaj esperanta (en mia traduko) kaj enhavos multajn ilustraĵojn.

Jam nun la verkon intencas traduki nacilingven japanaj, jugoslavaj, hungaraj kaj nederlandaj samideanoj.

Pri informoj koncerne la libron kaj ĝian tradukon bonvolu vin turni al la tradukinto:

mag. Isaj Dratwer  
Varsovio 10  
Skrytka 108 (Polujo)

### PERDITA EBLECO DE PROPAGANDO

Siatempe U.E.A., laŭ peto de landaj asocioj, eldonis la seslingvan faldfolion, efikan propagandilon en neesperantistaj internaciaj kongresoj. Regule U.E.A. nun detale informas la landajn asociojn pri tiaj kongresoj okazantaj en iliaj landoj, por ke oni zorgu pri disdonado de la faldfolio.

Mi ne scias en kia grado la landaj asocioj agas ĉe la neesperantistaj kongresoj per la faldfolio, sed mi scias ke en Norvegujo ni almenaŭ klopodas laŭeble disdoni la faldfolion en la kongresoj, kiuj okazas en nia lando.

Sed lastan someron mi spertis ignoradon, per kiu perdiĝis bona okazo de efika propagando en sciencista medio.

Partoprenonte internacian kongreson de zoologio en Londono, mi antaŭvidis ke U.E.A. informis al Brita Esperantista Asocio pri tiu kongreso, sed tamen mi skribis al B.E.A., informante ke mi mem kaj kelkaj pliaj esperantistoj partoprenos la kongreson, petante ke oni zorgu pri disdono de la faldfolio tie, ĉar tiel ni povus fari efikan propagadon en la kongreso. Alvenante mi tuj konstatis ke nenio estis farita. Mi turnis min al B.E.A., plendante pri la ignorado de mia peto, kaj ricevis la respondon ke en Londono okazas tiom da kongresoj, ke oni ne havas eblecon disdoni la faldfolion en ĉiuj tiuj kongresoj. Sed estas granda diferenco inter disvastigo en ĉiuj kongresoj kaj absolute neniam disvastigo de la faldfolio. Mi povas kompreni ke en Londono oni ne povas disdoni la faldfolion en ĉiuj kongresoj, sed ŝajnas al mi elementa devo de landa asocio klopodi por disdono en kongreso kiam oni scias ke ĝin partoprenos esperantistoj, kiuj volas kaj povas ĝin utiligi.

C. Støp-Bowitz

Komitatano de U.E.A., prezidanto  
de Norvega Esperantista Ligo.

### OFICIALA KOMUNIKO

Suplemento Oktobro 1958  
al N-ro 1

Magnetofona programo pri Pollando  
kaj Varsovio:

La 15-minuta muzika kaj parol-surbendigo (rapideco 9,5) enhavas inviton de la Ĉefurbestro de Varsovio Zygmunt Dworakowski kaj bonvenigajn salutojn de la Prezidanto de L.K.K., A. Rajski, kaj de la Konstanta Kongresa Sekretario.

#### Vizoj:

La polaj aŭtoritatoj decidis, ke la kongresanoj ricevos 50% rabaton de la kosto por enirvizoj: grupoj kaj karavanoj pagos nur 1,50 US. \$.

La internaciaj aŭtomobil-triptikoj validas en Pollando. Pliaj detaloj aperos en venonta komuniko.

#### Statistiko:

(ĝis fino de septembro) Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 6, Belgujo 8, Bulgarujo 3, Brazilo 3, Britujo 23, Danlando 13, Etiopio 1, Finnlando 3, Francujo 39, Germanujo 39, Hispanujo 5, Islando 2, Italujo 26, Japanujo 1, Jugoslavio 24, Maroko 1, Meksiko 1, Monako 5, Nederlando 4, Norvegujo 3, Novzelando 1, Pollando 48, Svedujo 9, Svisujo 7, Urugvajo 1, Usono 3. Entute 281 el 28 landoj. (Pasintjare 201 el 25 landoj).

Konstanta Kongresa Sekretario  
G. C. Fighiera

## 44-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Varsovio — 1. 8 aŭgusto 1959 —  
Pollando

JUBILEA ZAMENHOFA JARO

Sub honora protektado de la Ministro-Prezidanto de Pola Popola Respubliko  
JOZEF CYRANKIEWICZ

### OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 1 Oktobro 1958

#### Adreso:

Por korespondado sufiĉas la adreso: 44-a Universala Kongreso de Esperanto, Varsovio, Pollando.

#### Banko:

Narodowy Bank Polski, Warszawa, VII.OM. n-ro 1531-9-525.

#### Kotizoj:

La kongresaj kotizoj estas kalkulitaj en dolaroj. Ĝis fino de decembro validas jenaj kotizoj:

Kongresano . . . . .	US \$ 6
Edz(in)o . . . . .	3
Junu(in)o ĝis 20 jaroj kaj studentoj 2.	

Individuaj membroj de U.E.A., t.e. membroj, kiuj ricevas minimume la Jarlibron, rajtas rabaton de US \$ 1. Edz(in)o de Individua Membro ricevas rabaton de US \$ 0,50.

La kotizo rajtigas senpagan partoprenon en ĉiu programo organizita de la Loka Kongresa Komitato kaj la regulan ricevon de la kongresaj dokumentoj: oficialaj Bultenoj, Kongresa Libro, insigno, k.a. Oni povas aliĝi ĉu rekte per banko, ĉu ĉe la perantoj.

#### Societaj vesperoj:

La Loka Kongresa Komitato petas ĉiujn lokajn Esperanto-Societojn tra la mondo organizi almenaŭ unu inform-vesperon pri Varsovio kaj Pollando, mendante ĉe la Kongresa Oficejo jenan disponeblan materialon:

- Baza artikolo por prelegoj pri Varsovio;
- Magnetofona programo pri Varsovio: ĉ. 15' muzika kaj parol-surbendigo;
- Turismaj broŝuroj en Esperanto pri Varsovio.

La supre menciita materialo estas senpage disdonita de la Kongresa Oficejo al priinteresitaj lokaj societoj regule aliĝintaj al Landa Asocio.

#### Vizoj:

La Loka Kongresa Komitato jam faris koncernaĵajn paŝojn por ĝis ekstremo faciligi la ellason de vizoj, kiam necesaj, al Pollando. Pliaj detaloj sekvos en venonta komuniko.

#### Zamenhofaj festoj:

La 44-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio, urbo kie D-ro Zamenhof ellaboris sian genian verkon, solene festos per apartaj ceremonioj la centjaran datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof.

G. C. Fighiera  
Konstanta Kongresa Sekretario



### BIOGRAFIAJ INFORMOJ PRI D-ro L. L. ZAMENHOF

Dum pluraj jaroj s-ro Roland Jossinet el Parizo kolektis informojn pri la precizaj datoj de diversaj eventoj kaj okazaĵoj en la vivo de D-ro L. L. Zamenhof. La rezultojn de sia konsciencia esplorado li prezentis en formo de tabelo kaj proponis, ke CED publikigu ĝin. Pro la graveco de tiu verko CED kun dankemo akceptis la proponon kaj publikigis la laboraĵon en la Dokumentoj CED/Int./7 de la 20-a de junio 1958.

La dokumento havas kvar rubrikojn: datoj, lokoj, okazaĵoj kaj referencoj. Ĉe la fino troviĝas klarigo pri la mallongigoj kaj Geografia Indekso pri la nomoj de la lokoj, menciitaj en la tabelo.

CED estas konvinkita, ke la konci-zege prezentitaj rezultoj de tiu ĉi granda laboro de s-ro R. Jossinet altiros la atenton de ĉiuj seriozaj studentoj de la vivo de D-ro Zamenhof. La dokumento povos esti vaste utiligata en la Jubilea Jaro por verkado de studoj kaj artikoloj. Ĝi estas daŭra fonto de informoj pri la datoj de diversaj eventoj kaj okazaĵoj en la vivo de la aŭtoro de la Internacia Lingvo. S-ro Jossinet, kies adreso estas: 222, Rue La Fayette, Paris, 10, volonte akceptos eventualajn kompletigojn.

La dokumento estas jam sendita al la landaj asocioj kaj al la kunlaborantoj de la Informa Fako de UEA, kiel ankaŭ al ĉiuj komitatanoj de UEA. Pliaj ekzempleroj — ankoraŭ nur kelkaj — de la dokumento estas haveblaj de la Centra Oficejo de UEA, 7, Eendrachtsweg, Rotterdam, C. je la efektiva prezo de unu respond-kupono por unu ekzemplero.

### UEA EN GRAVA DOKUMENTO DE UNESKO

Ciun kvaran jaron la Generala Konferenco de UNESKO revizias la konsultajn rilatojn, kiujn havas tiu organizaĵo kun diversaj neregistaraj internaciaj asocioj. Ĉar UEA eniris en konsultajn rilatojn kun UNESKO en decembro 1954, la Generala Konferenco de UNESKO, okazonta en nov.-decembro 1958 en Parizo, decidus ĉu tiuj rilatoj estos plilongigitaj aŭ ne. La Plenuma Komitato de UNESKO jam ekzamenis la raporton, kiun faris UEA, pri la kunlaborado inter la du organizaĵoj en la pasintaj jaroj kaj rekomendis al la Generala Konferenco la plilongigon de la konsultaj rilatoj kun

UEA. La raporto de UEA aperis preskaŭ komplete en la dokumento de UNESKO 10 C/41 de la 30-a de junio 1958 kiel aldono 102. Ĝi havas kvin grandajn paĝojn. Koncize estas prezentitaj la celoj de UEA, la strukturo kaj membreco, la metodoj de laboro, la rilatoj de UEA kun aliaj internaciaj organizaĵoj kaj, ĉefe, la rilatoj inter UEA kaj UNESKO kun aparta konsidero al la kontribuo de UEA al la laboro de UNESKO inter 1954 kaj 1958.

Pri Esperanto aperis lastatempe pluraj aliaj informoj en diversaj dokumentoj kaj publikaĵoj de UNESKO. La ĉefaj estos publikigitaj en la sekvanta komuniko de CED.

### MALLONGAJ INFORMOJ

#### Fundamentoj de Interlingvistiko:

D-ro A. Bormann, kunlaboranto de CED, publikigis en *Sprachforum*, germanlingva revuo por la aplikita lingvistiko, gravan artikolon sub la titolo "Grundzüge der Interlingvistik". La artikolo aperis ankaŭ kiel speciala presajaĵo.

**Eminentaj personoj:** Laŭ la komisiio de CED, s-ino E. Lapenna el Zagreb, kunlaborantino pri statistikaj aferoj, entreprenis enketon kun la celo kolekti informojn pri eminentaj personoj, kiuj parolas la Internacian Lingvon. La enketo etendiĝas ankaŭ al forpasintaj eminentuloj, kiuj estis esperantistoj. Espereble la landaj asocioj kaj la aliaj organizaĵoj kaj unuopuloj, al kiuj ŝi sin turnis, donos la petitan helpon, tiel ke la enketo povos esti sukcese farita.

#### Filmo pri Zamenhof kaj lia verko:

En la septembra numero de "Esperanto" aperis pli detala informo pri la projektita filmo (p. 148). La direktoro de CED havis longan konversacion kun la reĝisoro, s-ro Jean Forge, post la kongreso en Mainz. Superflue akcenti la eksterordinaran gravecon de tiu ĉi filmo. CED donos ĉian eblan helpon, sed ĝi forte apelacias al ĉiu, kiu disponas pri pretaj filmbendoj ilustrantaj scenojn kaj fragmentojn de internaciaj aŭ landaj kongresoj de Esperanto, filmojn pri monumentoj aŭ stratoj de Zamenhof, pri kunvenoj aŭ manifestacioj por Esperanto, pri Esperantaj hejmoj, hoteloj, tendaroj, ekspozicioj k.s., proponi tiujn materialojn al la reĝisoro kaj la filmkompanio pere de la *Loka Kongresa Komitato de la 44-a U.K. de Esperanto, Warszawa, Pollando*.

**Malsaniĝo de Mag. W. Auld:** Antaŭ kelkaj monatoj grave malsaniĝis Mag. W. Auld, elstara kaj agema kunlaboranto de CED. Nun lia sanstato konsiderinde pliboniĝis kaj li plue prizorgos la Bibliografion kaj la materialojn por la publikaĵo de UNESKO Index Translationum. Al sia kunlaboranto CED tutkore deziras tre baldaŭan plenan resaniĝon kaj reakiron de la fortoj.

#### Esperanto en la publikaj bibliotekoj:

S-ro Mag. F. Winkel (Nederlando), kunlaboranto de CED, finis la mondampleksan enketon pri la Esperantlingvaj publikaĵoj en la publikaj bibliotekoj. Konciza raporto aperos en la sekvanta komuniko de CED.

**Biografio de D-ro L. L. Zamenhof en la angla:** La kunlaborantino de CED, f-ino Marjorie Boulton estas komisiita de la renoma eldonejo Routledge verki biografion de D-ro L. L. Zamenhof. La verko aperos en decembro 1959 okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. Se iel eble, CED eldonos la verkon de sia eminenta kunlaborantino ankaŭ en la Internacia Lingvo.

#### Donacoj por CED

	£	ŝ	p
Stato de la 26- de aprilo 1958	45-	5-	10
N.N. Britujo . . . . .			1-10
H. V. Rasmussen, Danlando . . . . .			10- 3
F. G. Blazquez, Venezuelo . . . . .			18- 9
Prof. G. Canuto, Italujo . . . . .			1- 0- 0
Gesinoroj Holmes, Britujo . . . . .			10- 0- 0
N. N. Britujo . . . . .			4- 0
N. R. Smith, Britujo . . . . .			15- 0
Kultura Domo Grésillon, Francujo . . . . .	8-	6-	8
E. H. Beck, Britujo . . . . .	1-	0-	0
N. N. San Diego, Usono . . . . .	3-	17-	10
F. V. Taylor, Aŭstralio . . . . .			10- 0
Joe Eisele, Usono . . . . .			14- 2
H. V. Rasmussen, Danlando . . . . .			10- 1
N. N. San Diego, Usono . . . . .	3-	18-	0
B. Tribe, Britujo . . . . .			10- 0
M. Lewin, Britujo . . . . .			2- 7- 0
C. P. Winchcombe, Aŭstralio . . . . .			2- 0- 0
O. Kuttelwascher, Aŭstrujo . . . . .			10- 0
A. Olsson, Svedujo . . . . .	1-	7-	7
Itala Esp. Federacio, Nacia kongreso Massa (1956) . . . . .	7-	9-	3
Itala Esp. Federacio, Nacia Kongreso Varese (1957) . . . . .	8-	6-	8
E. Maasbommel, Nederlando . . . . .			6- 0
H. V. Rasmussen, Danlando . . . . .			10- 3
H. W. King, Aŭstrujo . . . . .			16- 7
Centra Dana Esp. Ligo, Danlando . . . . .	4-	1-	11
B. Tribe, Britujo . . . . .			10- 0
A. Olsson, Svedujo . . . . .	13-	15-	11
N. N. en V. Nederlando . . . . .			9- 5
S. Cadenel, Francujo . . . . .			17- 0
D. B. Gregor, Britujo . . . . .	1-	0-	0
H. V. Rasmussen, Danlando . . . . .			10- 3
N. N. en V. Nederlando . . . . .			9- 5
S. Slot, Nederlando . . . . .			18- 9
H. V. Rasmussen, Danlando . . . . .			10- 0
Gesinoroj Holmes, Britujo . . . . .	1-	3-	6
Stato je la 5-a de oktobro 1958 . . . . .	£	126-	11-11

Al ĉiuj donacintoj plej koran dankon. Tute speciale dankon al tiuj donacintoj, kiuj daŭre rememoras pri CED, ekzemple al s-ro H. V. Rasmussen, kiu nur en tiu ĉi jaro 9 fojojn faris donacojn al CED; Gesinjoroj Holmes, kiuj ekde la fondiĝo de CED ĉiujare kontribuis por ĝiaj celoj konsiderindajn sumojn; S-ro M. Lewin, kiu tre ofte helpis finance al CED; Centra Dana Esperantista Ligo, Sveda Esperanto-Federacio, Svisa Esperanto-Societo, Itala Esperanto-Federacio, Novzelanda Esperanto-Asocio, kiuj ĉiujare donacas diversajn sumojn al CED. Specialan dankon ankaŭ al A. Olsson (Svedujo), kiu en mallonga tempo faris du belajn donacojn al CED; plue al donacintoj el San Diego kaj Nederlando, kiuj faris plurajn donacojn, sed ne deziris malkovri siajn nomojn. Fine, apartan mencion meritas la Kultura Domo Grésillon pro sia granda helpo al la laboroj de CED.

Donacojn por CED oni povas sendi al la Centra Oficejo de UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, C., Nederlando; al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, Rue de Chabrol, Paris, 10, Francujo; al la ĉefdelegitoj aŭ perantoj de UEA, aŭ al CED rekte je la nomo kaj adreso de ĝia direktoro, 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Britujo.

#### DOKUMENTO CED/5 EN SEP LINGVOJ

Ni jam informis, ke, okaze de la 70-jara datreveno de la publikigo de la verko de Zamenhof "Internacia Lingvo", CED eldonis specialan, eksterterian dokumenton sub la titolo "Sepdek Jaroj de la Internacia Lingvo" kun la signo CED-5. Tiu dokumento koncize prezentas la ĉefajn atingojn de Esperanto inter 1887 kaj 1957. La originala teksto estis publikigita en Esperanto. Samtempe CED mem eldonis ĝin en la angla lingvo (RDC/5) kaj sendis ĝin al ĉiuj regulaj ricevantoj de la CED-dokumentoj. Poste tiu dokumento aperis en la franca (presita kiel RDC/5), en la germana (presita kiel CED/5), en la nederlanda (presita kiel CED/5), en la pola (presita kiel CED/5), en la sveda (presita en la speciala aŭgusta-septembra numero de "La Espero", 1957, kaj, poste, kiel broŝureto). Ĝi estis publikigita ankaŭ en la nederlanda semajna gazeto *Groot Eindhoven* en januaro, 1958, en tri daŭrigoj. Antaŭ nelonge aperis la dua anglalingva eldono, prizorgita de la kunlaboranto de CED por teknikaj multobligoj, S-ro Rüdiger Eichholz, Esperanto-Press, Oakville, Ont. Kanado.

Entute la dokumento aperis en pli ol 100.000 ekzempleroj kaj sendube multe kontribuis al korekta informado pri la Internacia Lingvo en ĉiuj seriozaj medioj.

#### DELEGITOJ

##### Belgujo

Liège FD (fosfataj sterkoj) : vakas.

# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

#### OFICIALA INFORMILO

La 1-an de oktobro 1958.

N-ro 309

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de septembro kaj ankaŭ por komparo je la fino de septembro 1957 :

	1957	1958
Asociaj membroj	14169	13026
Individuaj membroj		
MJ	812	744
MA	5461	4800
MS	673	525
Pat.	5	5
DM	301	307
HM	52	47
JMJ	15	15
JMA	99	96
	<u>7418</u>	<u>6539</u>
	21507	19565

#### Britujo

Brighton (Sussex) VD : F-ino Norah Razzell, vendistino, 8, The Drove, Preston.

Heswall (Cheshire) D : vakas.

FD (budhismo) : vakas.

Sheffield (Yorkshire) D : vakas.

South Shield (Durham) FD (kvakerismo) : F-ino Ann Kinghorn, eks-poŝtovicistino, 20 Salmon Street.

#### Bulgarujo

Polski Trambes (Tirnovsko) D : S-ro Ĥristo Manolov, licea instruisto, FD (edukado) : La D.

Sofio FD (instruistaj aferoj) : S-ro Boris Simeonov, instruisto en teknika mezlernejo, str. Kiril i Metodi 55.

#### Francujo

Aries sur Tech (P.O.) D : S-ro Alexandre Maczkowski, pensiulo.

La-Houssaye-en-Brie (S et M.) FD (katolikismo) : Frato René Jean Marmou, katolika religulo, Prieuré Saint Martin.

Metz (Moselle) D : F-ino J. Zins, 2, rue Pierre Perrat.

Mulhouse (Haut Rhin) VD : vakas.

#### Germanujo

Augsburg D : vakas.

Frankfurt FD (filatelo) : vakas.

Herford (Westfalen) D : S-ro Hans Otterpohl, teknikisto, Golzstr. 22 FD (industria meblofabrikado) : La D.

Kissing b. Augsburg (Schwaben) D : S-ro Wilhelm Schmid, oficisto, Münchner Strasse 27.

München FD (katolikismo) : vakas.

Nürnberg (Bayern) FD (teatro) : S-ro Alexander Starke, aktoro kaj deklamartisto, Armin-Knab-Str. 12/p.

#### Hispanujo

Jerez de la Frontera (Cadiz) FD (turismo) : S-ro Pedro Naranjo Teran, industriisto, Negros 5.

Las Palmas de Gran Canaria (Islas Canarias) FD (japanologio) : S-ro Jose M. Lovato Peñalver, aeronautika inĝeniero-asistanto, General Goded 12 apt. 5.

#### Japanujo

Osaka FD (ĵurnalismo) : vakas.

#### Novzelando

Auckland FD (tekniko) : S-ro Erwin Jerzy Weber, inĝeniero, 2 Pleasant Road, Glen Eden.

Wellington FD (artefarita humo) : S-ro Malcolm Esmond Potts, poŝtovicisto, 34 Argentine Avenue, Miramar.

#### Pollando

Gdynia VD : S-ro Stanislaw Winnicki, maristo, ul. Starowiejska 14 6.

Itza D : S-ro Alexander Kotas, laboranto rig., str. Podzamecze 36.

FD (fotografado) : la D.

Przemków (Zielona Góra) D : S-ro Aleksander Parla, instruisto, ul. Zamkowa Nr. 5, pow Szprotawa.

FD (instruado) : La D.

Sovieszów D : vakas.

#### Usono

Avon (Connecticut) D : S-ro Robert Sparks, pastro, Burnham Road.

FD (kristanismo) : La D.

San Diego (California) D : S-ro Francis Helmuth, domkonstruisto, P.O. Box 6215.

#### NOVA DUM VIVA MEMBRO

Krajzl, S-ro J., Sarajevo, Jugoslavio.

#### MEMBRO SUBTENANTO 1958

527 Nordkvist, S-ro Helge, Bromma, Svedujo.

## FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo 5629.69 gld.

D-ro E. Balech, Argentino 14.75 gld.; H. Boffejon, Belgujo 7.60 gld.; D. G. Hill 10.65 gld.; D. Kennedy 20.- gld., Britujo. F-ino L. Fried 13.25 gld.; Alex Nielsen 2.75 gld.; H. V. Rasmussen 5.33 gld.; F. H. Solhauge 5.45 gld., Danlando. H. Koivu 11.- gld.; N.N. 33.- gld.; U. Pesonen 11.- gld.; E. Pynnönen 3.30 gld.; E. Soimi 8.80 gld.; A. Vuori 22.- gld., Finnlando. S-ro Buseine 8.30 gld.; F. Cadenel 8.30 gld.; H. Corbes 8.30 gld.; Pastro Degrelle 5.56 gld.; S-ino S. Fiat 8.30 gld.; L. Giloteaux 4.15 gld.; H. Herlemont 8.30 gld.; F-ino J. Le Boedec 8.30 gld.; S-ino J. Oheri 4.15 gld.; R.C.P. (Paris) 4.98 gld.; Pierre Royer 16.60 gld., Francujo. Georg Aschl 4.98 gld.; D-ro Erdmann Fritsch 9.05 gld.; Emil Markau 4.52 gld.; M. Marath 44.87 gld.; August Wetterstein 9.05 gld., Germanujo. N.N. en DDR 4.15 gld.; Antonio Criach 5.76 gld.; José Olivé 1.44 gld., Hispanujo. Antonio Gambuti 3.- gld.; Ing. O. Nanni 3.- gld.; Italujo. "Leif bezonas novan adreson en Moskvo", 23.95 gld. Kanado. W. Grolleman 10.- gld.; N.N. 3.- gld.; N.N. en V. 10.- gld.; J. L. Putto 10.- gld., Nederlando. A. G. Heppelthwaite 5.33 gld.; M. J. McNamara 53.25 gld.; P. Williams 5.33 gld., Nov-Zelando. Hugo Amaral 7.52 gld., Portugalujo. Algot Bild 14.69 gld.; Sture Fjordland 7.35 gld.; Gust. Johansson 7.35 gld.; Essy Larsson 11.01 gld.; Oskar Persson 7.35 gld.; Runo Stridell 11.01 gld., Svedujo. J. Eisele 18.80 gld.; R. Sparks 5.- gld., Usono. Oscar de Diego 39.20 gld., Venezuelo.

Entute 6223.77 gld. je 1.10.1958.

Donacu unu milonon — aŭ pli! — de viaj jaraj enspezoj por tiu ĉi gravega celo!

### GENERALA KASO

S-ino Combebias, Francujo 20.37 gld., S-ro J. Beaudoin, Francujo 20.38 gld., N.N. en V., Nederlando 6.10 gld., D-ro S. Culbert, Usono 49.80 gld.

### UNIVERSALA EKSPOZICIO

S-ro P. Williams, Nov-Zelando 2.66 gld.

### OFICEJA ILARO

N.N. en V., Nederlando 5.- gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas,  
Direktorino C.O.

## ANONCETOJ

La Internacia Ludoĉambro bonvenigas junulinon, kiu flue parolas Esperanton kaj ŝatas helpi nin en la domo. Poŝmono kaj restado en nia vegetara hejmo garantiata. Skribu al: K. Bjørnsby, Hartmannsvej 23, Kopenhago/Hellerup, Danlando.

24-jara finno deziras interŝanĝi leterojn aŭ pk ilustr. S-ro Harri Melasniemi, Kappalaisentie 18, Turku 9, Finnlando.

Kiuj eldonistoj (aŭ gesamideanoj) de Esperanto-fakgazetoj (aŭ religiaj) deziras unufoje interŝanĝi kun mi sian

E-gazeton kontraŭ "Germana Esperanto-Revuo". El ne-eŭropaj landoj ankaŭ kontraŭ aliaj Esperanto-revuo. Adalbert Masuhr, (21b) Hagen-Ekesej, Sonntagstr. 4, Germanujo.

Ĉu vi serĉas ian esperantan libron elĉerpitan? Petu mian libroliston. Librovendisto H. Veenstra, J. M. Kemperstraat 28, Amsterdam W., Nederlando.

**Esp. Klubo en Žďár n/Sáz**, Ĉeĥoslovakio, aranĝos la 17-an de decembro 1958 la letervesperon. Sendu al ni la salutaĵojn. Multaj niaj gesamideanoj deziras korespondi. Esp. Klubo, Žďár nad Sáz, hudebni škola, Ĉeĥoslovakio.

**Aŭskultu min**, gesamideanoj! Granda Esperanta Ekspozicio okazos en Verona (Italio) la 15-an de decembro 1958. Por tiu Ekspozicio mi petegas, ke vi skribu al mi almenaŭ unufoje leteron aŭ poŝtkarton bele afrankitajn. Vi rekomence ricevos ekspozician foton kaj diverskoloran poŝtkarton je la mondfame veronaj geamantoj Romeo kaj Julieta. Mi krome interŝanĝas, kvanton kontraŭ kvanto, poŝtmarkojn. Junulardelegito Gino Rossi, Via San Nazzaro 1, Verona, Italio.

**Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo**, per rekomendita letero. S-ro Novelli Giuseppe, Via Roma 5, Grottaferrata (Roma), Italujo.

**Hispana fraŭlino deziras korespondi tutmonda, interŝanĝi poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn.** Ma Mercedes Llimargas Cuspina, Str. Rosellón, 193, 1ª 2a Barcelona, Hispanujo.

**Letervesperon aranĝos la 25-an de januaro 1959 Nybro Esperantoklubo.** Skribu al Tage Borgström Västerängsgatan 7, Nybro, Svedujo.

**Koresponda Servo Mondskala.** Nuntempe, multaj adresoj haveblaj el Estonio, Francujo, Pollando, Japanujo, Jugoslavio, Bulgario. Skribu indikante viajn sekson, aĝon, profesion al: Daniel Luez, Laon (Aisne), Francujo, kaj enmetu respondkuponon por ĉiu petata korespondanto.

**Por restarigo de esperantista lernejo ni bezonas a) infanojn, b) domon, c) monon.** Ni malsukcesis nur pro manko de infanoj, kiujn ni nun serĉas unuavice. Grupoj kaj fakasocioj, diskutu kaj skribu al S-ro Smith, Hilltop Farm, Brighton Road, Crawley, Sussex, Britujo.

**La Navigantoj**, Örebro, Svedujo, invitas vin partopreni senkoston korespondan kurson pri la kristana kredo. Kontraŭ respondkuponon — se havebla — vi ricevos belaspektajn prospekton kaj unuan lecionon.

**Londona gastejo**, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 ŝ. 6 p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltigas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. D. Bytheway, "Flat Four", 1, Warrington Crescent, London W. 9, Britujo. Telefono Cunningham 4487.

**Vokado Tutmonda grandskala.** Ni sendos specialan poŝtkarton al ĉiuj helpantoj por ke ni pruvu la esperan-

tan valoron. Sendu revuojn, librojn (precipe religian) ktp. al Adventista Teologia Fakultato, Ena. Esperanto Klubo, Catende — Pernambuco, Brazilo.

**La nova Kristaneco**, bazita je la doktrino de sveda sciencisto kaj reformanto E. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adresu: Jan B. Vlach, Luzjicka 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakio.

**Gejunuloj!** Plurlingva revuo publikigas senpage vian korespondpeton. Montro la efikon de Esperanto por korespondemuloj! World Youth, Benczur ŭtca 34, Budapeŝt VI, Hungarujo. **Katolika Esperantisto!** Ĉu vi jam estas membro de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)? Jarkotizo ned. guld. 6.— = 24 steloj aŭ egalvaloro. Membroj ricevas la monate 20-paĝan Esperanto-revuon ESPERO KATOLIKA. Informojn donas la Administracio de IKUE: Frederikstraat 2, Dordrecht, Nederlando.

**Tutmondan pm. interŝanĝadon deziras Salamon**, Kiryat-Motzkín, Pob 8, Izraelo.

**Letervesperon ni aranĝos la 15-an de decembro 1958.** Bonvolu sendi bele afrankitajn bildkartojn, leterojn, div. presaĵojn. Viaj gratuloj helpas en nia propaganda laboro por Esperanto. Respondo garantiita. Esperantista Societo Zrenjanin, Poŝtfako 165, Zrenjanin, Jugoslavio. Por ekster-eŭropaj landoj la limdato estas la 1-a de februaro 1959.

**Mi deziras interŝ. pm. pri floroj, bestoj, kostumoj, fervojo, sporto kaj aliaj pm. de la tuta mondo, kontraŭ nederlandaj pm.** Prefere kompletaj serioj! Z. J. Buurkes, Lex-Althoffstr. 5-Ie, Amsterdam, W. Nederlando.

### FROSTAVALEN 1959

Petu jam nun informojn ĉe s-ro Jan Strönné, Amiralsgatan 36, MALMÖ, Svedujo. Sciigoj sendotaj post pretigado de la programo.

### LANDKARTO PRI SVEDUJO

Multekolora, E-lingva faldprospekto pri Svedujo senkoste havebla. Petu ĉe

Svenska Turisttrafikförbundet,  
Stockholm, Svedujo

Notu "Esperanto-eldono".

Skribu en Esp.

### FALDPROSPEKTO PRI MALMÖ

Multekolora, E-lingva faldprospekto pri Malmö senkoste havebla. Petu ĉe

Malmö Turisttrafikförening,  
Malmö, Svedujo.

Menciu ke temas pri "Esperanto-eldono". Skribu en Esp.

Angla eldonejo tre prestiĝa komisiis Marjorie Boulton verki seriozan

## Anglan Biografion de Zamenhof

rapide. Si petas do personajn memorojn, nepresitajn dokumentojn aŭ informojn pri ili, fotografaĵojn ktp. pri la Majstro. Bv. skribi antaŭ la jarofino!

Ĉio pruntita estos zorge resendita post kopiado.  
Adreso: 1 Inglefield Avenue, High Lane, Burslem, Stoke-on-Trent, Anglujo.

## LA NICA LITERATURA REVUO

sub ĉefredaktoreco de  
Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj  
aperas ĉiun duan monaton  
32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ  
egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98  
Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj  
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: 7. Av. Léon-Gourdaul 5. Bd. Stalingrad  
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)  
Francujo. Administracio:

Gratulu por

## Kristnasko kaj la Nova Jaro

per

## „Malnovaj Holandaj Majstroj“

diversaj reproduktaĵoj de famaj pentraĵoj,  
delikate presitaj kun esperanta teksto.

Serio de po 6 diversaj duoblaj kartoj kun kovertoj:  
3.— gld.; 12 steloj

MENDU NUN ĈE U.E.A.!

OKAZE DE LA ZAMENHOF-JARO:

### FOTO DE ZAMENHOF,

poŝtkarto 0,20 gld.; 0.80 steloj

### GRAVURAJO LINOLEUMA,

21 × 27 cm de Reto Rossetti, portreto  
de Zamenhof tre taŭga por kluboj,  
kunvenejoj ktp. 0,75 gld.; 3 steloj

### BIOGRAFIAJ INFORMOJ

### PRI D-RO L. L. ZAMENHOF

de R. Jossinet 1 resp. kup., 1,20 steloj  
Ĉion liveras la C.O. de U.E.A.

### MALNOVAJ GAZETOJ SERĈATAJ:

„La Esperantisto“ 1890 n-roj 5-12, 1892 n-roj 1-12  
„Lingvo Internacia“ provn-ro dec. 1895, 1898 n-roj  
10-11, 1899 n-ro 12  
Proponojn kun prezo al Fr. Weinstein, Hamaapilim  
6/2, Holon, Israelo.

### ESPERANTO-KLUBOJ

ĉie en la mondo  
anoncu viajn adreson, kunventagon kaj horojn al la  
Centra Oficejo por mencio en Jarlibro 1959 laŭ  
tarifo de 1/10 de la kotizo M.A. en via valuto,  
pagota al la kutimaj perantoj.

### 12 FOTO-AFIŜOJ DE U.N.E.S.C.O.

kun Esperanto-teksto  
memorige al la Deklaracio pri la Homaj Rajtoj  
Eldonas U.N.E.S.C.O.  
Sendos U.E.A. tuj post apero kontraŭ 4 resp. kup.  
aŭ 5 steloj.

### VARBU REKLAMOJN POR JARLIBRO 1959

Ankoraŭ estas tempo!  
Limdato prokrastita. Sendu la reklam-  
ojn al la C.O. antaŭ la 20-a de Novem-  
bro 1958  
NI FIDAS JE VIA KUNLABORO!

## ANGLA ANTOLOGIO

1000-1800

Unika verko pri grava literaturo  
Redaktis: William Auld kaj Reto Rossetti  
Eldona Fako de U.E.A.  
Prezo: 10.- gld.; 40.- steloj  
Mendu ĉe U.E.A.

## Retoriko

kun aparta konsidero al esperanta parolarto  
de

## IVO LAPENNA

Dua Eldono reviziita kaj kompletigita  
Prezo: 11.— gld. bindita 9.— gld. broŝurita  
Eldono de la aŭtoro  
Mendu ĉe U.E.A. aŭ ĉe la aŭtoro

MENDU NUN POR LA TAGO DE LA ESPERANTO-LIBRO, la 15-a de DECEMBRO!

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam